

EL POPOLO CÍNIO





La granda gv
danto Prezidant
Maŭ instruas :
ni: "Sen popol
armeo la popol
havas nenion." I
ankaŭ diris: "Ni
nacia defendo este
firmigita kaj neni
ajn imperiisto este
permesata denov
invadi nian terite
rion. Niaj popul
armitaj fortoj dev
esti konservataj ka
disvolvataj sur baz
de la heroa ka
elprovita Popol
Liberiga Armeo.
Ni havos ne nu
potencan terar
meon, sed ankaŭ po
tencan aerarmeon
kaj potencan mar
armeon."

Jen Prezidant
Maŭ kune kun si
intima kunbata
lanto kamarad
Lin Biaŭ.

Timi Nek Penadon Nek Morton, Plifortigi Sinpreparon kontraŭ Milito por Defendi la Patrion

La granda Ĉina Popola Liberiga Armeo estas popola armeo persone kreita kaj gvidata de nia granda ĉefkomandanto Prezidanto Maŭ kaj rekte komandata de Vicprezidanto Lin, kaj estas la firma apogŝtono de la proletara diktaturo de nia lando. Kun ĝisfunde revolucia spirito timi nek penadon nek morton, la Ĉina Popola Liberiga Armeo armita per Maŭzedongpenso kaj hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio nepre liberigos la sanktan teritorion de nia lando Tajvan, kaj certe ekstermos ĉiujn aŭdace entrudiĝontajn agresantojn firme, ĝisfunde, tute kaj komplete!

(Supre) Sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**Se neniu atakos nin, ni atakos neniun; se iu atakos nin, ni certe kontraŭatakos lin**”, nia limgarda trupo gardstaranta ĉe la norda pordego de nia patrio vigleplene gardas Ĝenbaŭ-insulon — la teritorion de nia patrio.

(Sube maldekstre) Aertrupo de la Popola Liberiga Armeo firme decidis ĉiam vive studi kaj vive apliki Maŭzedongpenson, lerni de la herooj timantaj nek penadon nek morton kaj fariĝi bonaj aviadistoj de Prezidanto Maŭ!

(Sube dekstre) La limgardaj batalantoj kaj ĥalĥazaj popolanoj de la kontraŭreviziisma plejfronto Pamira Altebenaĵo kune patrolas kaj ĉiam tenas singardemon por defendi la sanktan teritorion de sia patrio.







Heroa mararmeo de nia lando patrolas sur la maro, vicleplene gardante la mardefendon de la patrio!



Serioze studante kaj efektivigante la brilan penson de Prezidanto Maŭ pri "popola milito", la milicianinoj de Fugianfronto plifortigas sinpreparon kontraŭ milito por bone plenumi kunan defendon de popolo kaj armeo. Se imperiismo kaj reviziismo aŭdacos entrudiĝi, ili eks-termos ilin en la vasta maro de popola milito!

Kamarado Lin Biaŭ en la Periodo de la Liberiga Milito en Nordoriento

EN la granda Liberiga Milito, la nordorienta batalkampoj estis unu el la ĉefaj batalkampoj de la tuta lando. En pli ol du jaroj, la nordorienta Popola Liberiga Armeo (t.e. la Kvara Kampa Armeo poste) liberigis la tutan Nordorionton, tiel terure draŝinte la trupojn de Ĉiang Kajŝek, ke li trifoje ŝanĝis la ĉefkomandanton kaj perdis milionon da armeanoj. Tuj sekve nia armeo marŝis suden, kaj, kunagante kun frataj trupoj, liberigis Beping (nun Pekinon) kaj Tiangin kaj poste transpasis Jangzi-riveron. Kien montris la milita standardo, tien sturmis la trupoj kun impeto de lavango kaj fine flirtigis la ruĝan flagon sur Hajnan-insulo. En la liberiga afero de nia patrolando tiu trupo faris senmortan meriton. Tio estas rezulto de la saĝa gvido de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ de la ĝusta komando de la komandanto kamarado Lin Biaŭ. La historio konvinke pruvis, ke nia Komandanto Lin (per tio oni kutimas intime nomi kamaradon Lin Biaŭ) estas la plej intima kunbatalanto kaj plej bona lernanto de Prezidanto Maŭ kaj elstara marksism-leninisma aktivanto en politikaj kaj militaj aferoj. Dum la ŝtormaj jaroj de la Liberiga Milito en Nordoriento li kune kun aliaj gvidantaj kamaradoj de la nordorienta Popola Liberiga Armeo alte tenis la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj decideme kondukis la popolon al venko. Per sia firmeco li plifortigis la memfidon de la popolo por venki venton kaj ondojn kaj per sia saĝo gvidis ĝin triumfe atingi la celokon.

En la periodo de proksimume kvar jaroj de la Liberiga Milito, mi okupiĝis pri gvida laboro en

la unua kaj deka kolonoj, sub la rekta gvido de Komandanto Lin. Dum tiu tempo mi ricevis multe da liaj instruoj, tial mi ankaŭ havis okazon iom koni lian personecon. Utiligante postlaborajn horojn mi redaktis fragmentojn de miaj memoraĵoj en legaĵon por la kamaradoj.

VORTOJ EN GILIN

Estis ŝtormaj jaroj.

En majo de 1946, la freneza atako de Ĉiang Kajŝek al la nordorienta Popola Liberiga Armeo atingis sian kulminon. En la grava strategia loko Siping nia unua kolono faris defendan batalon de 33 tagoj kaj post tio ni retiriĝis laŭ ordono. Ankaŭ la aliaj trupoj sur ĉiuj batalfrontoj estis retiriĝantaj. Ni retiriĝis al la malvasta regiono de Tonghua kaj Lingiang de suda Manĉurio, najbare de Koreio, kaj al la malproksima norda bordo de Songhua-rivero . . .

Rigardante, ke pecego post pecego da liberigitaj regionoj falis sub la ferajn hufojn de Ĉiang Kajŝek, ni tre indigniĝis kaj peziĝis nia koro. En sia tempo Ĉiang Kajŝek vendis la Nordorionton al la japana imperiismo. Sub la gvido de la Partio, la nordorienta popolo kaj Kontraŭjapana Alianca Armeo persiste kondukis 14-jaran gerilan militon; kaj ĉirkaŭ la kapitulaco de Japanio, la Partio sendis el Jan-an, Orienta Ĉinio kaj Norda Ĉinio kvindek mil kadrojn kaj cent mil armeanojn al Nordoriento. Dank' al nia peniga batalado, stariĝis vastaj

liberigitaj regionoj nelonge post la kapitulaco de Japanio. Tamen la bandito Ĉiang Kajŝek malamis, ke la nordorienta popolo akiru demokration kaj liberon, kaj provis vane ekstermi la nordorientan Popolan Liberigan Armeon kaj starigi sian aŭtokratan regadon. Li ekspedis 300,000 armeanojn armitajn per usona ekipaĵo el sudo de Ŝanhajguan-pasejo al Nordoriento, kie li daŭre komplotis kun la restantaj japanaj agresantoj, denove uzis pupajn policanojn kaj akceptis kaj reorganizis kelkcent mil pupajn armeanojn kaj banditojn. Li varbis ĉiujn diablojn kaj demonojn kaj tre arogantis. Ekde januaro de 1946, li senĉese faris atakojn al la liberigitaj regionoj kaj en aprilo kaj majo li disvolvis grandan kampanjon kun Siping kiel la centro. Fronte al la malamikoj havantaj evidente superajn fortojn, ni provizore evitis la lanĉpinton de ilia atako kaj faris grandskalan retiriĝon. Kiel disvolviĝos la situacio? Pri tio ni tre urĝe deziris akiri klaran instrukcion de Komandanto Lin.

Je la 18-a de majo nia armeo retiriĝis el Siping. En la 26-a mi rapidis nokte al Gilin por peti de Komandanto Lin instruon pri la nuna situacio kaj taskon.

Longa estas vintro en Nordoriento. Jam estis majo, sed venis nur komenca printempo. Folioj apenaŭ burĝonintaj maldense tremadis susure en la frosta vento. La trupoj retiriĝintaj el Siping trapasis stratojn de Gilin kaj marŝis nordorienten, laŭplane daŭrigante sian strategian retiriĝon. Oni antaŭen iris haste kaj serioze. Mi juĝis, ke ni eble baldaŭ retiriĝos ankaŭ el Gilin. Tiam [mi pli maltrankviliĝis kaj urĝe deziris tuj vidi Komandanton Lin por peti de li instrukcion pri la situacio kaj tasko.

Post militiro Komandanto Lin ĵus alvenis kaj provizore ripozis en malnova etaĝdomo ĉe la bordo de Songhua-rivero. Enirinte la kabineton mi vidis mapojn pendigitajn plene sur la muroj. Komandanto Lin estis en flava kotonŝtofa uniformo kaj absorbite rigardanta mapon. Ĉio estis en kvieto.

“Vi laciĝis dum la vojaĝo? Sidiĝu kaj ripozu.” Kun rideto Komandanto Lin stariĝis por min akcepti. Sidiginte min, li prenis tolan sakon de sur la muro kaj verŝis el ĝi teleron da rostitaj sojfaboj kaj diris ridetante: “Estas nenio bongusta por vin regali, nu, manĝu iom da sojfaboj.” La aplomba sinteno de Komandanto Lin kaj la kvieteco en la ĉambro infektis min kaj iel ankaŭ mia koro trankviliĝis. Mi ekraportis al li pri la stato de la trupo: “La trupo jam retiriĝis el Siping laŭ via ordono

kaj antaŭenmarŝas al la difinita loko. Tre bonorda estas la retiriĝo. La malamikoj akiris nur malplenan urbon kaj kaptis eĉ nenium el niaj vunditoj.”

Komandanto Lin atenteme aŭskultis mian raporton senĉese kapjesante kontenteme. Kiam mi finis mian raporton, li demandis pri kelkaj aferoj kaj mi respondis al li ĉiujn demandojn. “La defenda batalo de Siping estis tre bone kondukita, ĝi mortigis kaj vundis grandan nombron da malamikoj. En la batalo ni unuflanke akiris ĝisfundan konon de la kuomintanga trupo kaj aliflanke ni malfruigis ĝian atakon kaj plenumis nian dispozicion.” Kiam Komandanto Lin analizis al mi la aktualan situacion, lia voĉo estis nelaŭta, sed klara kaj fortoplana. “Post nia retiriĝo el Siping, Ĉiang Kajŝek nepre okupos grandajn urbojn. Tio ne gravas, kaj ni povas lasi al li ĉiujn urbojn sude de Songhua-rivero.” Tiutempe mi ne povis plene kompreni lian parolon. Komandanto Lin travidis mian koron kaj sur lia malgrasa vizaĝo ekfulmis rideto. “Jes, ĉiujn al li. Kiam li okupos la urbojn li do ŝarĝos sin per balastaĵo, ĉar okupinte la urbojn li devos ilin gardi. Por gardi tiom da urboj, li devos dividi siajn armitajn fortojn kaj tiel ni povos ekstermi ilin unu post alia. Ĉu la urboj ne estos balastaĵo, se ili trenos liajn krurojn? Se li volas porti balastaĵon, do ni ĝin donos al li. Ju pli multajn kaj pezajn balastaĵojn li prenos sur sin, des pli bone estos. Kiam tiuj balastaĵoj lin nemo-vebligis, tiam ni koncentros superajn fortojn por ekstermi liajn trupojn unu post alia.” Tion dirante Komandanto Lin rapide formis ringon per siaj ambaŭ manoj farante decideman geston.

“Ho, por tio do!” Jam tute klariĝis al mi la afero, mia koro tuj sereniĝis kaj mi kore ridetis.

Komandanto Lin iom meditis, kaj sub liaj ambaŭ densaj brovoj radiis severa okulbrilo. Li diris malrapide: “Tre malfacila estas nia tasko! Nun la malamiko estas multe pli potenca ol ni. Ni devas nin prepari por peniga batalo de pluraj jaroj kaj nur tiamaniere ni povos venki la malamikon. Ni devas eduki la trupon akriigi la singardemon kontraŭ la malamiko, sinprepari por superi malfacilojn kaj fari longdaŭran batalon. Troviĝas multe da elektro en Nordoriento, ĉu ne? Ni tamen ne devas apogi nin sur ĝi. Ni muelos rizon ne per elektro, sed per pistilo. Ni ne devas nin apogi sur la granda industrio de Nordoriento, sed devas disvolvi metiindustriion. Ni devas nin prepari por manĝi kaj tranokti sub la libera ĉielo kaj venki la froston de Nordoriento. Sed plej grave

estas, ke ni devas fari sufiĉe da spirita preparo kaj havi firman memfidon pri nepra venko. La supereco de la malamiko estas portempa, ni certe povos transiĝi de malforteco al potenceco. Post nelonga tempo ni certe venkos Ĉiang Kajŝek.

“La nuna ĉefa tasko,” serioze daŭrigis Komandanto Lin iom laŭtigante sian voĉon, “estas solide starigi bazlokojn, bone plifirmigi la bazlokon norde de Songhua-rivero. Oni neniam devos labori supraĵeme. Unue ni devas komplete ekstermi la banditojn, sendi kelkdek mil kadrojn al la kamparo por fari agraran reformon kaj rapide mobilizi la amasojn. Ju pli rapide kaj profunde estos mobilizitaj la amasoj, des pli bone estos, kaj tiamaniere des pli grandiĝos nia forto por batalo kontraŭ Kuomintango.” Li ripetade emfazis: “Por ekstermi Kuomintangon ni nepre devas havi bazlokon, kaj por starigi solidan bazlokon, ni nepre devas plene mobilizi la amasojn. Sen amasoj ni havos nenion. La ŝlosilo de venko estas mobilizado de la amasoj.” Li ankoraŭ diris, ke dum mobilizado de la amasoj, ni devas fari politikan edukon kaj militan trejnadon al nia armeo kaj disvolvi kaj plifortigi ĝin kaj daŭre altigi ĝian batalforton; ni devas vaste disvolvi gerilan militon en la postfronto de la malamikoj, formi situacion sieĝi urbojn per la kamparo por fari ofensivon, ekstermi la malamikojn kaj kapti la urbojn en kunagado kun la ĉefaj fortoj en estonteco.

La vortoj de Komandanto Lin donis al mi senliman memfidon kaj neelĉerpeblan forton. Ŝajnis al mi, ke mi abrupte staris pli alte kaj vidis pli malproksimen, kaj ke la alfrontataj kelkcent mil invadantaj banditaj armeanoj de Ĉiang Kajŝek estas nur aro da rampantaj formikoj. Revenante al la trupo mi iris laŭ la granda vojo sur la riverbordo kontraŭ vespera vento kaj sentis min eksterordinare agrabla.

En aŭgusto de 1946, Komandanto Lin faris pli klaran juĝon pri la disvolviĝo de la situacio en la kunveno de la Nordorienta Buroo de la Centra Komitato de KPĈ. Li diris, ke la disvolviĝo de la milita situacio en Nordoriento ĝenerale trairos tri periodojn: la malamikoj atakas, dum ni prenas movadan militon defensivan kaj iniciative retirigas el kelkaj regionoj — tio estas la unua periodo; okupinte urbojn, la malamikoj malstreĉas sian atakon, dum ni serĉas ŝancojn en movado por ekstermi efikajn fortojn de la malamikoj kaj komencas ofensivon en partoj — tio estas la dua periodo; ni lanĉas plenampleksan ofensivon, grandkvante ekstermas efikajn fortojn de

la malamikoj, izolas la restintajn malamikojn en kelkaj punktoj kaj linioj kaj fine ekstermas ilin — tio estas la tria periodo.

Ke Komandanto Lin povis fari tian klaran antaŭjuĝon pri la situacio de Nordoriento kaj havis memfidon pri nepra venko, tio estas rezulto el tio, ke li praktike aplikis la grandan ĉiamvenkan armilon Maŭzedongpenso. Pri la situacio de la tuta lando Prezidanto Maŭ saĝe montris, “ke la supereco de Ĉiang Kajŝek en militaj fortoj estas nur momenta fenomeno kaj ĝi estas faktoro kiu ludas rolon nur provizoran, ke ankaŭ la helpo de la usona imperiismo estas faktoro, kiu ludas rolon nur provizoran, dum la kontraŭpopola karaktero de la milito de Ĉiang Kajŝek kaj la simpatio aŭ antipatio de la popolo estas faktoroj, kiuj ludas rolon konstantan, kaj ke ĉi-rilate la Popola Liberiga Armeo trovas sin en supereco. Patriota, justa kaj revolucia en karaktero, la milito kondukata de la Popola Liberiga Armeo certe akiros la subtenon de la tuta popolo. Tio estas la politika fundamento por venko super Ĉiang Kajŝek.” Nia armeo faris strategian retiriĝon ĝuste laŭ la milita principo difinita de Prezidanto Maŭ “celi ĉefe ekstermon de efikaj fortoj de la malamiko sed ne konservon aŭ prenon de urboj kaj lokoj”. La fakto pruvis ke la disvolviĝo de la milita situacio en Nordoriento tute sekvis la direkton montritan de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj tute konformis al la antaŭkalkulo de Komandanto Lin. Kvankam Ĉiang Kajŝek eluzis sian tutan rimedon en Nordoriento, li tamen ne povis eskapi la sorton difinitan de Komandanto Lin: Ĝis la liberiĝo de Ŝenjang je la 2-a de novembro de 1948, oficiale finiĝis la trilogio de “atako, defensivo kaj fiasko” ludata de li dum du jaroj. Alta takso de Komandanto Lin pri konstruo de bazloko ja profunde enkorpigis la penson de fondo de bazloko ĉiam emfazatan de Prezidanto Maŭ. Ankaŭ la faktoj plene pruvis, ke tio estas la plej fundamenta problemo por ekstermi la malamikojn kaj akiri venkon. Dum Kuomintango senbride okupis urbojn kaj rabis teron, ni ja uzis niajn ĉefajn fortojn en konstruo de bazlokoj en norda Manĉurio, kaj samtempe persistis en gerila milito en suda Manĉurio. Ni kombinis mobilizadon de la amasoj kun ekstermado de la banditoj kaj en ĉirkaŭ unu jaro tute ekstermis la pli ol 200,000 banditojn de Ĉiang Kajŝek. Tiel en norda Manĉurio aperis senprecedence stabila socia ordo kaj prospero de la popola vivo. Tiamaniere ni neniigis ĝenaĵojn en la postfronto kaj formis la situacion ke ni alfrontis malamikojn nur en unu flanko kaj ne en la aliaj tri flankoj, tiel ke ni povis laŭvole ataki dum ofensivo kaj defendi dum

retiriĝo. Dum la ekstermado de la banditoj, 15,000 kadroj iris al la kamparo. Respondante al la alvoko de la Nordorienta Buroo de la Partio kaj Komandanto Lin, ili “demetis siajn ledŝuojn kaj ledsakojn, prenis sur sin kamparanajn vestojn kaj ekmanĝis sorgon”, ili plenkore profundigis en la amasojn kaj levis ŝtorman movadon de agrara reformo. Kamparanaj amasoj ricevis agrojn kaj produktajn rimedojn, kaj senprecedence altiĝis ilia klaskoncio. Ili rompis sian ortodoksan ideon kaj iluzion pri Ĉiang Kajŝek kaj tagon post tago turniĝis al ni. Akirinte klaran vidon pri la vera vizaĝo de Ĉiang Kajŝek ili nomis Nordorienton regatan de Ĉiang Kajŝek kiel “la duan Manĉurion”. Ili varme subtenis la Komunistan Partion kaj nomis Prezidanton Maŭ kiel sian savanton. Post la agrara reformo, sub la slogano “defendi la hejmlokon kaj teron” la popolamasoj levis altan tajdon de subteno al la fronto. Vastaj amasoj de junuloj unu post alia sin anoncis por aliĝi al la armeo. Ili prenis armeaniĝon kiel gloron. Ĉie en la kamparo ardis la tajdo sendi al la armeo sian filon aŭ edzon rajdantan surĉevalo kun ruĝa

floro surbruste. Freŝa sango seninterrompe fluis en la armeon. La personaro de la trupo ofte estis plena kaj senĉese organiziĝis novaj trupoj. Ĝis aŭtuno de 1947, la nordorienta Popola Liberiga Armeo jam havis pli ol dek kolonojn kun sume pli ol miliono da personoj, kiel Komandanto Lin diris: “Nia forto pli kaj pli grandiĝis.” Kontraŭe, la trupoj de Kuomintangoj pli kaj pli malgrandiĝis kaj velkis kvazaŭ brulanta kandelo. En 1948, la trupo de Ĉiang Kajŝek sieĝata en la urbo Ĉangĉun ne povis ricevi homojn por plenigi sian personaron kaj bezonatajn materialojn. Ilia “ĉefkomandanto” povis nur sendi 100,000 tablojdojn de vitamino kaj disdonis al ili po unu por montri sian “subtenon”, kaj tio fariĝis ridindaĵo en nia armeo. Kun paso de la tempo kiam ĉiu plua disvolviĝo de la situacio pruvis la ĝustecon de la antaŭvido de Komandanto Lin, mi ĉiam ekstervole rememoris la vortojn de Komandanto Lin en la malfacila jaro 1946, kaj mi ĉiam pensis kun estimo kaj adoro: Kiel malproksimvida estas nia Komandanto Lin!

(*daŭrigota*)

La Popola Armeo Amas la Popolon

VU DI

LA Ĉina Popola Liberiga Armeo, armita per Maŭzedongpenso, estas armeo, kiu batalas heroe por la proletara revolucio kaj estas formita el idoj de laboristoj kaj kamparanoj. Ĝi ĉiam tenas intiman rilaton kun la popolamasoj kiel fiŝoj kun akvo, kaj “ekskluzive” kaj “senrezerve” servas al la popolo.

TRANSGRIMPI MONTOJN POR PROPAGAN- DI MAŬZEDONGPENSON

En la areo de Ligiang ĉe la bordo de Ginŝa-rivero, Junnan-provinco, troviĝas vojo nomata Ruĝa Armeo. Antaŭ 34 jaroj, la Ĉina Laborist-

Kamparana Ruĝa Armeo trapasis tiun vojon survoje al la nordo por rezisti kontraŭ la japanaj agrosantoj kaj semis tie revolucion. Hodiaŭ, sur la nomita vojo troviĝas propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso konsistanta el 20 batalantoj de la Liberiga Armeo, kiu entuziasme propagandas Maŭzedongpenson al la popoloj de diversaj naciecoj, transgrimpante montojn kun la *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*.

En la altaj montoj ondantaj ĉe Ginŝa-rivero, dise loĝas naŝioj, tibetanoj kaj lisuoj. Ne timante altajn montojn kaj longan vojon la propaganda taĉmento ofte iris al la vilaĝoj de tiuj diversnaciecaj popoloj por porti al la malriĉkamparanoj kaj mal-

superaj mezkampanoj la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ. Foje, kun torĉoj kaj ĵus faritaj kopioj de la plej nova instrukcio de Prezidanto Maŭ, ili transpasis nokte Ginŝa-riveron por iri al Dongŝan 30 kilometrojn for de la garnizonejo por fari tie propagandon. Sur la vojo returne al la kazerno, la propaganda taĉmento aŭdis, ke unu tibeta familio loĝas sur la pinto de Lamogu-monto. Tiu monto estas la plej alta el la ĉirkaŭaj montoj. Por atingi la montpinton komencante de la montpiedo oni devas iri pli ol 35 kilometrojn. Por porti la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ al la laboranta popolo de frata nacieco, la batalantoj decidis marŝi al Lamogu-monto.

Sur la alta monto, la grimpado estas malfacila kaj danĝera. Laŭ vojeto inter dornaj arbustoj la batalantoj grimpis sur la monton. Ĉe la talio de la monto ili spiris pli kaj pli malfacile pro la maldenseco de la aero. Tiam ili laŭte recitis la instruon de Prezidanto Maŭ: **“Niaj trupoj ekzistas ekskluzive por la liberigo de la popolo, kaj laboras senrezerve por la interesoj de la popolo”**, kaj tuj kreskis al ili senfina energio. Unuspire ili grimpis ĝis la montpinto kaj donis la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ al la tibeta maljuna avo Ŝakjuandingvang. La maljuna avo estis kortuŝita ĝis larmoj kaj diris premante la manojn de la batalantoj: **“Vi portas al ni la voĉon de Prezidanto Maŭ, kiu aparte hele lumigas la korojn al ni liberigitaj servutuloj. Ni revolucios de generacio**

al generacio strikte sekvante Prezidanton Maŭ!”

La diversnaciecaj popoloj ĉe la bordo de Ginŝa-rivero varme bonvenigas la propagandan taĉmenton de Maŭzedongpenso same kiel ili bonvenigis la Ruĝan Armeon siatempe. Multaj malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj emocie diris: La Ruĝa Armeo portis al ni siatempe revoluciajn semojn; nun vi portas al ni Maŭzedongpenson. Vi ja estas alia generacio de la Ruĝa Armeo sur la vojo Ruĝa Armeo!

KURAĜE ANTAŬEN FENDANTE ONDOJN

En la rikolta sezono de laminario prezentigis sceno de riĉa rikolto en la akvoprodukta plantejo de Aŭŝan-komunumo de Vendeng-gubernio, Ŝandong-provinco. Sub la kuraĝigo de la spirito de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Partio, navede tien reen rapidis sur la maro boatetoj, sur kiuj multnombraj komunumanoj streĉe laboris.

Iutage, sur la Flava Maro ekblovis ventego kaj ruliĝis ondegoj. Eksterordinare granda marfluo atakis la laminarian plantejon. En la 240-mua plantejo, la laminarioj estis elradikigitaj en tutaj vicoj de la marfluo kaj forflosis ĉien. Estis videble ke la frukto de penema kaj diligenta laborado de la komunumanoj troviĝas en la danĝero esti forportita de la ondegoj.

Komandantoj kaj batalantoj de la PLA-a trupo por subteni maldestruktrulojn en la Gisejo de la Unua Aŭtofabriko de Ĉangĉun iris profunde en la amasojn por fari zorgeman politik-ideologian laboron. Jen kamarado Ma Kili korverŝas kun membroj de la revolucia gvida grupo.



Por fari urĝan savon iu milita boato de la Nordmara Floto tuj navigis en la nokto. Aŭdinte, ke la milita boato iros savi havaĵon de la popolo, la komunisto kaj estro de la meĥanika kaj elektra grupo Kju Liangĉang, kiu tiam loĝis en la kuracejo pro malsano, tuj rapidis al la boato por partopreni la laboron. Oni admonis lin reveni al la kuracejo, sed li diris maltrankvile: "Kiel batalanto de la Liberiga Armeo kaj komunisto, mi ja devas iri por savi la havaĵon de la popolo, kiam ĝi estas en danĝero!" Tuj post eldiro de tiuj vortoj, li rapide iris al sia batalposteno.

Alveninte al la laminaria plantejo, la milita boato tuj formis sturmtrupon por urĝa savado kune kun dekelke da boatetoj de la komunumo kaj bataladis kontraŭ la ventego kaj marfluo kaj kolektis la forflosantajn laminariojn.

Kiam la batalantoj trenis revene la boatetojn plenajn de laminario per sia milita boato, subite blovis 8-grada uragano kaj pluvo falegis torente. La milita boato estis pelata de la uragano al rifplena regiono de la maro. Se ĝi ne rapide foriĝus de tie, estus danĝero de tuŝegiĝo kun rifo. Tiam la batalantoj vidis, ke ĉe proksimo estas ankoraŭ tri boatetoj, kiuj baraktis kontraŭ la uragano forte balanciĝante sur ondegoj, kaj la vivo de la komunumanoj sur tiuj boatetoj estas serioze minacata. Riskante sian propran sekurecon, la batalantoj ree ĵetis sin en la batalon por savi tiujn komunumanojn.

Furioze muĝis la uragano, alte leviĝis ondegoj, kaj la pluvego falis pli kaj pli forte. Disvolvante la spiriton timi nek penadon nek morton, la batalantoj unuiĝis en batalo kontraŭ insidaj ventego kaj ondegoj kaj proksimigis la militan boaton al la boatetoj. Post pli ol unuhora luktado ili fine sukcesis savi la 5 klasajn fratojn el la danĝero kaj levi ilin sur la militan boaton, kaj revenigis ilin al la haveno sekure.

FLUGADO TRA NUBARO POR LA POPOLO

Por defendi la teritorian aeron de sia patrolando kaj la Grandan Proletaran Kulturajn Revolucion, kiom da heroaj batalantoj en la batalaj vicoj de la Popola Aera Armeo faris, kun la revolucia spirito timi nek penadon nek morton, novajn meritojn en flugado tra nubaro.

Ĉu Hujfen, la vicestro de iu aviada eskadro de aera armeo, estas aviadistino kun sentima revolucia spirito. Sub la brilo de Maŭzedongpenso, dank' al tiu revolucia spirito tiu orfino en la mal-

nova socio ekhavis sur si ŝtalajn flugilojn, bataladis en la vasta aero kaj faris kontribuojn por la patrolando kaj popolo.

En iu ventega nokto, ĵus plenuminte sian taskon en la aero kune kun siaj batalamikoj, Ĉu Hujfen ricevis ordonon flugi al iu loko por transporti unu ruĝgvardianon, kiu estis vundita en defendo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. Ĉu Hujfen decideme diris: "Ni nepre oferos nian tutan forton por savi la ruĝgvardianon."

Portante la profundan prizorgon de Prezidanto Maŭ al la ruĝgvardiano, la aeroplano rekte penetris en la noktan aeron kaj flugis en plej alta rapideco al la loko, kie troviĝis la vundito. Por porti la vunditon al la destinita loko ĝustatempe, Ĉu Hujfen kaj ŝiaj batalamikoj tuj direktis la aeroplanon ree supren kontraŭ vento kaj flugis inter nuboj sen preno de akvo kaj manĝo. Forta aerfluo senĉese puŝis la aeroplanon jen supren jen malsupren. Kun la revolucia spirito timi nek penadon nek morton, Ĉu Hujfen firme manipulis la stirilon kaj pafis la aeroplanon el la tavolo de aera fluo. Fine, ili venke plenumis la taskon ĝustatempe post 8-9-hora flugado.

"Por defendi la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, necesas kuraĝe sturmi en bataloj kaj por servi al la popolo oni devas sin dediĉi ekskluzive kaj senrezerve." Jen estas la ŝtala ĵuro de Ĉu Hujfen. Iutage, aro da aeroplanoj flugis al katastrofa areo por paraŝute ĵeti provizaĵojn. Kiam ili volis ĵeti provizaĵojn al iu malgranda riverdigo, ili renkontis grandan malfacilon. Ĉar, post faro de multaj cirkloj laŭ la digo ili ne trovis taŭgan lokon, al kiu ili povis fari ĵetojn. La kvanto de benzino reduktiĝis iom post iom, kaj oni devis baldaŭ refluigi al la bazloko. La ĵetisto maltrankvile demandis al Ĉu Hujfen: "Viceskadroestrino, ĉu ni ankoraŭ klopodu fari ĵetojn al tiu riverdigo?" Decideme respondis Ĉu Hujfen: "Kamaradoj, Prezidanto Maŭ instruas al ni: '**Nia devo estas respondeci al la popolo**', ni alportas ne nur provizaĵojn sed ankaŭ la prizorgon de Prezidanto Maŭ al la popolo de la katastrofa areo. Ni absolute ne devas preterlasi niajn gefratojn sur la riverdigo." Poste, ŝi tuj decideme turnis la kapon de la aeroplano, sentime ĝin mallevis ĝis la alteco de 200 metroj kaj daŭre ĉirkaŭflugis super la riverdigo. Fine ŝi trovis proksime al la riverdigo malgrandan altejon, kaj trafe ĵetis sur ĝin provizaĵojn. La amasoj sur la riverdigo eksplodis per huraoj pro emocio: "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Longe vivu Prezidanto Maŭ!"



Grupo por subteno de agrokulturo de iu PLA-a trupo venis al loĝejoj de olunĉunoj profunde en la Granda Hing-an-montaro kaj donacas portretojn de Prezidanto Maŭ kaj la ruĝajn libretojn Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong al la ĉasistoj en la landlima regiono.



La 208-a Hospitalo de PLA organizis kuracan taĉmenton por iri profunde en la kamparon kaj servi al la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj. Jen membroj de la taĉmento kuracas post-sekvajon de infanparalizo por infano de malriĉkamarano en Suangjang-gubernio, Gilin-provinco.

La Popolo Varme Amas

Sian Armeon

“AKVO POR SUBTENO AL LA ARMEO”

Sub la pasejo “Amikeco” en Pinghiang de Guanghi-provinco en la suda landlima regiono de nia patrio estas granda monto alta je pli ol mil metroj super marnivelo. La sesa taĉmento de iu trupo de PLA garnizonas sur la pinto de tiu monto. Iun nokton, venis al ĝi vico da homoj laŭ kruta vojeto, vektoportante puran akvon kaj kantante kantojn en vortoj de Prezidanto Maŭ. Ili estis Ĝuang-aj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Longjaŭ-a Produkta Grupo ĉe la montpiedo, kiuj portis akvon al sia trupo kun profunda proletara sento.

Kial ili alportis akvon en nokto? La afero tiel okazis:

En la tago, Ĝuang-aj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la nomita produkta grupo vizitis la batalantojn sur la montpinto kaj faris por ili revoluciajn literaturajn kaj artajn prezentojn. Kiam ili revenis, estis jam vespere post la 9-a. Sed la maljuna malriĉkamparano Li Maŭjing neniel povis endormiĝi kuŝante sur lito. Ĉar li trovis sur la monto, ke en la du manĝoj prenitaj de PLA-anoj la rizo ne estis plene kuirita, kaj tial li estis tre maltrankvila. Li pensis en si, ke la PLA-anoj tutjare gardas tie por defendi nian patrolandon, kiel ili povas plenumi la taskon prenante tian manĝon? Ĉu la fuŝon en kuirado kaŭzis manko de brulaĵo aŭ akvo? Mi nepre devas trovi la kaŭzon. Tion pensante li ne plu povis kuŝi sur la lito kaj ekiris al la montsupro. Veninte al la kuirsubplotono, Li Maŭjing atente observis la

restantan rizaĵon. Laŭ sia sperto li konkludis ke la kaŭzo estas nesufiĉo de akvo. Post pridemando li informiĝis ke al la taĉmento akvo ne sufiĉas jam de kelkaj tagoj. Ĉar la akvo konsumata sur la monto estas ricevata el la putro ĉe la montpiedo. Lastatempe mankis pluvo, kaj ankaŭ la akvo en la putro malmultiĝis. Por ke la amasoj havu sufiĉe da akvo por produkto kaj ĉiutaga vivo, la batalantoj klopodis plejeble redukti la uzadon de akvo. Li Maŭjing estis tre kortuŝita de la revolucia spirito de la PLA-anoj, kiuj prizorgas la amasojn kaj prenas venkon de malfaciloj kiel gloron. Sur la vojo returne lia koro tre agitiĝis, kaj rememoroj pri multaj pasintaĵoj svarmis en lia cerbo. Antaŭ la Liberiĝo, liaj familianoj estis jardungitoj de bienulo kaj lia patro mortis sub vipo de la bienulo. En tre malgranda aĝo Li Maŭjing jam laboris por bienulo. Iufoje li estis batita de la bienulo, tiel ke lia tuta korpo ŝvelis. La bienulo ne donis al li manĝon, sed devigis lin labori. Estas la Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj sendis al lia hejmloko intimulojn PLA-anojn kaj savis lian familion, tiel ke lia familio povas vivi feliĉe. Ĉion ĉi tion li forgesis neniam! Nun, kiam li vidis ke al la intimuloj akvo ne sufiĉas, li estis tre maltrankvila. Kaj li simple volus levi la puton de la montpiedo kaj doni ĝian akvon al la batalantoj!

Reveninte al sia grupo, Li Maŭjing proponis ke oni portu akvon al la PLA-anoj. Ĉiuj aplaudis la ideon kaj decidis tuj komenci. En somera nokto ankoraŭ restis la varmo de la tago sur la monto, kaj en nebula lunlumo oni ne povis klare vidi la malrangan vojeton kaj ĉiam povis fali. Kuraĝigante sin per la ĝisfunde revolucia spirito de la PLA-anoj



La Tria Garaĝo de la Tiangin-a Popola Aŭtomobila Servo kaj la unua roto de PLA-a trupo garnizonanta en Tiangin lernas unu de la alia kaj kune progresas. Jen laboristoj de la garaĝo venas al la kazerno de PLA por danki la armeanojn pro iliaj prizorgo kaj helpoj al la garaĝo.

“**timu nek malfacilojn nek morton**”, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj finfine portis sitelojn kaj sitelojn da pura akvo al la montpinto.

KUKO EL SONKO

Iun matenon, la sesa roto de iu trupo de PLA okazigis kunvenon sur konstruejo por rememori la pasintan amaron en komparo kun la hodiaŭa feliĉo. La politika direktanto Giang Ĉanghong donis al la batalantoj lecionon per rememoro de pasinta amaro tenante per ambaŭ manoj kukon el sonko. La sloganoj “Ne forgesu la klasan amaron, kaj firme memoru pri verŝitaj sango kaj larmoj!” “Konduku la revolucion ĝis la fino!” ŝvebis super la konstruejo.

Por rakonti pri tiu kuko, oni devas komenci de la arme-subtena aktivado de malriĉkamparanino onklino Ŝi Gujning de la Kaŭŝan-a Produkta Brigado, kie garnizonas la sesa roto.

En la malnova socio onklino Ŝi multe suferis kruelan ekspluaton de la bienula klaso. En ŝia

kvin-jara aĝo, ŝia patro mortis de malsato kaj ŝia pliĝa frato estis perforte soldatigita de Kuomintang. Estas la Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ, kiuj sendis la Popolan Liberigan Armeon por savi ŝian familion el la maro de mizero. Tial ŝi havas por Prezidanto Maŭ profundan proletaran senton kaj sentas apartan intimecon ĉe PLA-anoj.

Antaŭ la veno de la sesa roto, la revolucia komitato de la brigado jam informis tiun ĝojigan aferon al ĉiuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la vilaĝo. Informiĝinte pri tio onklino Ŝi tuj organizis familian kurson por fojrefoje studi la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ “**subteni la armeon kaj ami la popolon**”. Ŝia unua filo, 13-jara Vanzi proponis al la panjo donaci kuiritajn ovojn al onkloj PLA-anoj. La unua filino Vanhua diris, ke post longa marŝo la PLA-anoj certe estas lacigitaj, ke ili iru lavi kaj kudri vestaĵojn kaj litaĵojn por ili. Sed onklino Ŝi havis alian ideon. Ŝi diris: “Mi aŭdis, ke la kamaradoj de la sesa roto plejparte estas junuloj, kiuj naskiĝis en la nova socio kaj kreskis sub la ruĝa standardo,



PLA-anoj, kiuj subtenas agrokulturon en Daĝaj, helpas la malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn firme teni la revolucion kaj energie stimuli la produkton kaj estas senlime amataj de la lastaj. Jen malriĉkamparano-komunumanino donacas notlibron al PLA-ano por esprimi sian varman amon al sia armeo.

tial ili ne spertis la suferojn kaj turmentadon de la malnova socio. Por ke tiuj junuloj ne forgesu la amaron de la malnova socio, necesas ofte fari al ili klasan edukon.” La onklino decidis fari kukon per sonkoj kreskantaj sur la monto Kaŭŝan kaj akvo el la rivero Vulong kaj sendi ĝin al la intimuloj PLA-anoj kiel esprimon de subteno. La ideo de la onklino ricevis aprobon de ĉiuj familianoj. Ŝi tuj faris sonkan kukon kaj ĝin enpakis zorgeme en plasta saketo.

Vespere, kune kun malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj ruĝgardianoj onklino Ŝi venis kun la kuko al la garnizonejo de la sesa roto por partopreni vesperkunvenon de armeanoj kaj popolanoj. En la kunveno onklino Ŝi donacis la kukon al la sesa roto, la kamaradoj tre dankis ŝin. Onklino Ŝi diris: “Mi donacis la kukon al vi ne por ke vi danku min, sed por ke vi ne forgesu la klasan amaron, firme memoru la verŝitajn sangojn kaj larmojn kaj strikte sekvu la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ por konduki la revolucion ĝis la fino.”

Depost tio, la partia filio de la sesa roto prenas la kukon donacitan de onklino Ŝi kiel materialon por rememorigi antaŭan amaron kaj faris senĉese klasan edukon al la batalantoj.

“GARDSTARA GVIDANTO” SUR MARDEFENDA ANTAŬPOSTENO

Tondroj kaj pluvo aparte furiozis en la nokto. Ĝuste tiam venis la vico de Malgranda Ĉeng, nova batalanto de iu trupo de PLA garnizonanta en Ŝantoŭ de Guangdong-provinco por gardstari. Meng Ĉuanji, la estro de la tria plotono, neniel povis sin kvietigi pro li. Kontraŭ vento kaj pluvo li iris al la postena budo sur la marbordo por gvidi Malgrandan Ĉeng bone plenumi lian taskon dum la deĵoro. Ekster lia atendo, tie jam staris “gardstara gvidanto” apud Malgranda Ĉeng. Tiu homo surportis pluvmantelon el palmaj haroj kaj bambuan ĉapelon kun fiŝforke en unu mano kaj etendis la alian manon al la ondanta maro. Li gestadis ŝajne rakontante ion al Malgranda Ĉeng.

Post atenta rigardo Meng Ĉuanji trovis ke tiu estas neniu alia ol onklo Lin Kungin, membro de la loka komunumo kaj aktivulo en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ.

Vidante la konatan silueton de onklo Lin, Meng Ĉuanji sentis varmon en la koro. Onklo Lin gvidis batalantojn gardstari en tia malbona vetero jam ne nur unu aŭ du fojojn. Al la Popola Liberiga Armeo, tiu maljuna fiŝisto multe suferinta en la malnova socio havas klasan senton mare profundan. Antaŭ la Liberiĝo, per malgranda boato kaj eluzita reto, Lin Kungin kaj lia plijuna frato tutjare baraktis surmare en vento kaj ondo, sed lia familio ankoraŭ ne povis sate manĝi kaj varme sin vesti. En 1943 la japana agresa armeo blokadis tie la marbordon. Por vivteni sian familion, onklo Lin kaj lia frato fiŝkaptis sur la maro riskante danĝeron. Ili renkontis japanan kanonboaton, ilia boato estis disrompita de la kanonboato per tuŝego, la frato dronis en la maro, Lin Kungin sukcesis kapti tabulon de la rompita boato kaj poste estis savita de aliaj fiŝistoj. De tiam lia familio vivis pli mizere. La liberiga armeo

gvidata de Prezidanto Maŭ savis lian familion el la fundo de la mizero. Onklo Lin rilatas al la PLA-anoj pli intime ol al siaj familianoj. Iun fojon blavis forta vento dum malfluso, iu ligna boato uzata de la trupo por transporti dolĉan akvon, kies kablo estis rompita de vento kaj ondo, flosis for de la bordo kun la malfluso. Rimarkinte tion, onklo Lin tuj remis al ĝi kaj retiris ĝin al la bordo. Poste li firme ligis la boaton al la bordo per nova kablo prenita el sia hejmo. Alian fojon, la trupo protektis digon en pluvo, kaj en reveno ili ĉiuj estis tramalsekigitaj. Timante ke la batalantoj malvarmumiĝos, onklo Lin tuj preparis dekoktaĵon de zingibro kaj donis ĝin bovlon post bovlo al la batalantoj.

Ĉiuj tiuj emociaj pasintaĵoj aperis unu post alia en la cerbo de Meng Ĉuanji. El la nobla figuro de onklo Lin, li vidis feran bastionon de unuiĝo de armeo kaj popolo firme starantan sur la senlime longa marbordo de la patrolando. **“Tio estas efektiva fera bastiono, nefrakasebla, absolute nefrakasebla per kia ajn forto.”** Se la malamikoj aŭdacos agresi nian landon, ili certe estos komplete frakasitaj!



Servi al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj ricevi reedukon de ili. Jen komunumanino instruas kamaradinon PLAninon pri kamplaboro.

Datreveno de la Ekmarŝo de la Laborista Klaso en la Super- strukturan Sferon

LA 27-a de julio de la kuranta jaro estas la brila datreveno de la ekmarŝo de nia laborista klaso en la superstrukturan sferon.

La 27-an de julio, 1968, ŝultroportante la grandan historian mision, ke **“la proletaro nepre devas praktiki plenampleksan diktaturon super la burĝaro en la superstrukturo inkluzive de la diversaj kampoj de kulturo”**, la unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso de nia lando fondita laŭ la granda batala ordono de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj gvidata de la Komunista Partio de Ĉinio torente ekmarŝis en Kinghua-universitaton, kie amasiĝas intelektuloj. Tiu ĉi granda revolucia ago malfermis novan eraon, en kiu la armeo de industriaj laboristoj ascendas, sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, la politikan scenejon de batalo, kritiko kaj reformo en la superstruktura sfero.

En la pasintaj pli ol unu jaroj post sia enmarŝo en Kinghua-universitaton, strikte sekvante la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ, la unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso de nia lando batalis solidarece sub la direktado de la granda doktrino de Prezidanto Maŭ pri daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo, okupis kaj transformis la kulturen kaj edukajn poziciojn per Maŭzedongpenso, unuigis, edukis kaj remuldis la vastajn amasojn de intelektuloj sub la granda alvoko de Prezidanto Maŭ, ke **“la laborista klaso nepre devas gvidi ĉion”**, kaj gvidis ilin marŝi de venko al venko laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

STRIKTE SEKVI LA GRANDAN STRATEGIAN DISPOZICION DE PREZIDANTO MAŬ

La somero de 1968 estis alia grava historia momento en la antaŭenmarŝado de la Granda Pro-

letara Kultura Revolucio de nia lando.

Tiutempe, bonega estis la situacio en nia granda socialisma patrolando post pli ol dujara batala baptado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, la centmilione nombraj amasoj de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj strikte sekvis la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ kaj marŝis antaŭen en venko. Sub tiu bonega revolucia situacio, la plej grava problemo kiel konduki ĝisfine la Grandan Proletaran Kulturen Revolucion en la superstruktura sfero sin prezentas antaŭ la popolo kaj ankaŭ antaŭ la junaj ruĝgardianoj kaj la revoluciaj instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de Kinghua-universitato.

Alte tenante la grandan standardon **“pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj”** en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la junaj ruĝgardianoj kaj revoluciaj instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de Kinghua-universitato kondukis bravan batalon kontraŭ la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Kinghua-universitato, kaj donis pezan baton al la burĝaraj reakciaj fortoj de tiu universitato. Sed nelonge poste, pro siaj neĝisfundeco kaj ŝanceliĝemo en revolucio, nombro da intelektuloj estis influita de la reakcia teorio de “multaj centroj” t.e. tiu de “sen-centro”, dronis en la marĉon de burĝara fraciismo kaj postrestigis la Grandan Proletaran Kulturen Revolucion en Kinghua-universitato al la disvolviĝo de la ĝenerala situacio. La stato en tiu lernejo kaj aliaj institucioj montris, ke la granda historia tasko de la proletara eduka revolucio kaj batalo, kritiko kaj reformo en la superstruktura sfero estas neplenumbla sole de la intelektuloj, kaj por tio nepre necesas la partopreno de laboristoj kaj batalantoj de la Liberiga Armeo kaj la firma gvidado de la laborista klaso.

Je tiu grava historia momento en la antaŭenmarŝado de la Granda Proletara Kultura Revolucio de nia lando, nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la grandan batalan alvokon al la laborista klaso, ke ĝi marŝu en la superstrukturan sferon.

Antaŭtagmeze de la 27-a de julio, alte tenante portretojn de Prezidanto Maŭ kaj kun la brile ruĝa libreto *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* en ambaŭ manoj, industriaj laboristoj kaj PLA-aj batalantoj de la ĉefurbo marŝis en Kinghua-universitaton kun levita kapo kaj per gigantaj paŝoj. Ili ja volis okupi kaj transformi, per Maŭzedongpenso, la kulturen kaj edukajn poziciojn longe regatajn de la burĝaro!

LA MONARKIO DE INTELEKTULOJ ESTIS DISROMPITA

La vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj de Kinghua-

universitato varme bonvenigis la karulojn alsenditajn de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ — la laboristan kaj PLA-an propagandan taĉmenton de Maŭzedongpenso. Ili konkure disportis la novaĵojn pri ĝia alveno kaj senĉese laŭte kriadis: “Salutojn al la laborista klaso! Salutojn al la Liberiga Armeo!” “Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!”

Sed la plenmano da klasaj malamikoj ne volontis mem retiriĝi de sur la historia scenejo. Ili eĉ senkaŝe faris subfosajn aktivadojn kun la vana intenco elpeli la propagandan taĉmenton el la universitato. Kaj iuj intelektuloj, kies mondkoncepto estis ne bone transformita, plenenergie defendis la monarkion de intelektuloj.

Tio estis serioza klasa batalo.

En la komenco, ili diris: “La laboristoj zorgu nur pri la fabrikoj, sed ne pri la aferoj de lernejoj.” La membroj de la taĉmento respondis firme: “Ni laboristoj bone administros ne nur la fabrikojn sed

Laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en Kinghua-universitato varmkore donas reedukon al intelektuloj. La bildo montras, ke ĝia membro Li Kjuanhaj (la maldekstra) intime interbabilas kun revoluciaj instruistoj kaj studentoj dum laboro en kamparo.



ankaŭ la lernejojn. La laborista klaso bone administru la lernejojn kaj ĝisfunde ŝanĝu la fenomenon ke burĝaraj intelektuloj regas la lernejojn, kio ja estas la potenco al ni donita de Prezidanto Maŭ!”

Kaj ili diris poste: “Malkleruloj ne kapablas gvidi la intelektulojn.” Tiam membroj de la propaganda taĉmento respondis: “Ni laboristoj senlime fidelas al Prezidanto Maŭ, senlime fidelas al Maŭzedongpenso kaj senlime fidelas al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj tio ĉi estas la plej granda kapablo!”

La lukto estis komplika. La propaganda taĉmento en Kinghua-universitato vizaĝis al la komplika stato ke **“tiuj kiuj faris ideologiajn erarojn miksiĝas kun tiuj kies kontraŭdiro kun ni estas kontraŭdiro inter ni kaj la malamikoj, kaj portempe estas malfacile ilin distingi”**. Tamen laŭ la granda ins-

Veterana laboristo Liu Kingŝuang (la maldekstra en la fronto), membro de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso laboranta en Kinghua-universitato, gvidas studentojn labori en la universitato.



truo de Prezidanto Maŭ **“faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon”**, la propaganda taĉmento kuraĝis kaj lertis fari batalon, tenante en penso la ĝeneralan situacion kaj timante nenian malfacilon. Ili rigore distingis la du specojn de kontraŭdiroj kun malsamaj naturoj kaj firme rebatis la frenezan reatakon de la klasaj malamikoj; al la vastaj amasoj de instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj ili faris penigajn kaj zorgemajn ideologi-politikajn laborojn, organizante centojn da grupoj por propagandi la plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ kaj helpi la amasojn trompitaĵajn altigi sian politikan konscion kaj distingi pravon disde malpravo.

La 5-an de aŭgusto, 1968, kiam la laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso venke antaŭenmarŝas, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis al ĝi karan donacon mangoj;

La 15-an de aŭgusto, 1968, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ donis intiman aŭdiencon al reprezentantoj de la propaganda taĉmento;

Kaj tuj poste, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ faris serion da plej novaj instrukcioj:

“La laborista klaso nepre devas gvidi ĉion”!

“La laboristaj propagandaj taĉmentoj devas longdaŭre resti en la lernejoj, partopreni la plenumon de ĉiuj taskoj de batalo, kritiko kaj reformo en la lernejoj, kaj por ĉiam gvidi la lernejojn”!

La grandaj instruoj kaj prizorgoj de Prezidanto Maŭ forte stimulis la membrojn de la propaganda taĉmento, profunde edukis la instruistojn, studentojn, oficistojn kaj laboristojn kaj peze batis la klasajn malamikojn. La unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso ascendis la politikan scenejon de superstrukturo.

Sed la klasaj malamikoj ne volontis akcepti sian malvenkon. En la unuaj tagoj post kiam la propaganda taĉmento eniris Kinghua-universitaton, la plenmano da klasaj malamikoj aplikis alian subfosan rimedon instigi parton de la instruistoj kaj studentoj forlasi la universitaton. Tio refoje konigis al la propaganda taĉmento, ke enirinte en la kulturan kaj edukon poziciojn, la laborista klaso havas la batalan taskon gajni intelektulojn en lukto kontraŭ la plenmano da klasaj malamikoj por tie firme stari kaj akiri venkon en la batalo kontraŭ la malamikoj kaj en gvidado de la eduka revolucio. En tiu batalo, la laborista klaso nepre devas agi kiel Prezidanto Maŭ instruis **“gajni ĉiujn progresemajn intelektulojn sub la influon de nia partio”** kaj unuigi la plejmulton de homoj ĉirkaŭ

sin kaj sian grandan partion la Komunistan Partion de Ĉinio.

En kiom multaj matenoj la veteranaj laboristoj kaj la instruistoj kaj studentoj kune studis la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ la “tri popularaj artikoloj” kaj pacience vekadis ilian konscion batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon, por akceli la amasojn de la du organizoj al efektivigo de revolucia unuiĝo. En kiom multaj noktoj, la veteranaj laboristoj kritikis kune kun la instruistoj kaj studentoj la teorion de “estingiĝo de klasbatalo” de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj kondukis ilin al unuiĝo por kune batali kontraŭ la malamikoj. Membroj de la propaganda taĉmento verŝis en ilin profundan senton de la proletaro, ilin edukis per Maŭzedongpenso kaj vekis ilin unu post alia. Bankrotis la intrigo de la klasaj malamikoj kaj fine unuiĝis la revoluciaj amasoj de la du longe disigitaj organizoj!

Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, ke “escepte de dezerto, ĉie kie estas homamaso sin trovas maldekstruloj, mezstarantoj kaj dekstruloj kaj ankoraŭ tiel estos eĉ post dek mil jaroj”, la propaganda taĉmento ĝenerale starigis vicarojn de aktivuloj en la instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj kaj prenis ilin kiel sian apogan forton en la gvidado de la amasa movado de batalo, kritiko kaj reformo de la universitato.

Rilate al la kadroj kaj amasoj kiuj faris diversajn erarojn, senprokraste ĝi faris laboron de unuiĝo — kritiko kaj memkritiko — unuiĝo.

Al tiuj kies eraroj apartenas al la kontraŭdiro inter la malamiko kaj ni, kaj kiuj tamen povas konfesi siajn krimojn kun mallevita kapo kaj havas la decidemon penti kaj fari korekton, ĝi insistis doni al ili ŝancon fariĝi novaj homoj kaj fari kontribuojn por elaĉeti sin.

Kaj tiamaniere, strikte observante la diversajn proletarajn politikojn de la Partio la unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso mobilizis ĉiujn pozitivajn faktorojn, unuigis ĉiujn unuigeblajn, kaj tre rapide formiĝis vasta revolucia armeo.

EDUKI LA INTELEKTULOJN IRI LA DE PREZIDANTO MAŬ MONTRITAN VOJON

Post kelkfoja batalo, la plenmano da klasaj malamikoj ricevis hontindan fiaskon. Ili tamen denove disblovis intrige la aserton: “Vi povas okupi Kinghua, sed ne povas ĝin transformi!”

La diabla babilo spegulis la restaŭran sonĝon de la plenmano da klasaj malamikoj, kaj samtempe ĝi pliapaŝe komprenigis per sia negativa ekzemplo al la laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso, ke sur kultura kaj eduka pozicioj kia Kinghua-universitato tiel profunda estas la venena influo de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio postlasita en la pasintaj dekelkaj jaroj kaj tiel obstinaj estas la tradiciaj ideoj de la ekspluataj klasoj, formitaj dum centoj da jaroj, ke “mensaj laborantoj estas regantoj dum fizikaj laborantoj regatoj” k. s., kaj ke peniga estas la tasko transformi ĝin per Maŭzedongpenso kaj eduki la plejmulton de la intelektuloj iri la de Prezidanto Maŭ montritan revolucionan vojon. Sed kiel ajn multaj estas la malfaciloj, ili tamen estas neniom gravaj, se oni posedas Maŭzedongpenson.

Prezidanto Maŭ montris: “El la lernantoj kulturitaj de la malnovaj lernejoj, la pliparto aŭ plejparto povas sin kombini kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, kaj iuj eĉ ion atingis en inventado kaj kreado, sed ili devas esti reedukataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj sub la gvido de ĝusta linio por ĝisfunde ŝanĝi sian malnovan ideologion. Tiaj intelektuloj estas bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.” La propaganda taĉmento decidis, laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ, transformi Kinghua-universitaton en brile ruĝan grandan lernejon de Maŭzedongpenso kaj eduki la plejmulton de la intelektuloj en homojn bonvenajn al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Iu docento estas tipa viktimo de la kontraŭrevolucia reviziisma eduka linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki. De longa tempo li starigis al si la t. n. maksimumon “tekniko — ora profesio, dum politiko” — danĝer-metio” kaj ĵuris okupiĝi pri tekniko dum la tuta vivo. Multaj instruistoj kaj studentoj opiniis, ke li estas homo malfacile edukebla kaj remuldebla. La propaganda taĉmento firme kredis, ke Maŭzedongpenso povas transformi ĉion. La taĉmentanoj helpis lin studi verkojn de Prezidanto Maŭ, donis al li klasan edukon, kondukis lin konscie batali kontraŭ egoismo kaj kritiki reviziismon kaj faris kun li dekojn da korverŝaj interbabiloj por solvi liajn problemojn kaj vivajn pensnodojn. Finfine la docento konsciigis. Li diris: “En la pasinteco mi opiniis, ke absorbite sin okupi pri la profesia laboro sen zorgo pri politiko estas la plej ‘sekura’ vojo; nur nun mi vidas klare, ke tio ĉi estas ĝuste la plej danĝera vojo per kiu la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj trenas min al restaŭro de kapitalismo!” Ekde tiam li prenas la vortojn de Prezidanto Maŭ “sen



Dank' al reeduko de la laborista klaso, docento (la dua de maldekstre) de Kinghua-universitato forlasis la burĝaran eraran vojon de strebado por si mem kaj plenumis du teknikajn renovigojn kune kun laboristoj de la Pekina Hinhua-presejo.

ĝusta politika vidpunkto signifas sen animo” kiel sian maksimumon, diligente vive studas kaj vive aplikas verkojn de Prezidanto Maŭ, aktive batalas sur la plejfronto de batalo, kritiko kaj reformo kaj estis elektita de la amasoj kiel batalanto kun “kvin bonoj” antaŭnelonge.

La ŝanĝiĝo de la docento estas unu el la multaj kortuŝaj ekzemploj starigitaj de la unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedong-penso de nia lando en transformado de la kultura kaj eduka pozicioj kaj reedukado de la intelektuloj.

La intelektuloj, kiuj antaŭe sub la kontraŭ-revolucia reviziisma eduka linio “ne aŭdas eksterdomajn okazaĵojn, nur absorbite legas scienc-teknikajn librojn”, nun aktive partoprenas la movadon de batalo, kritiko kaj reformo kun firma decido konduki la proletaran edukan revolucion ĝis la fino.

Ili ankoraŭ konkure iras labori en plej penigaj lokoj por hardi sin. Apenaŭ kelkajn monatojn

post sia alveno al fabrikoj aŭ vilaĝoj, iuj jam plenumis kune kun laboristoj aŭ malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj unun post alia taskojn de teknika renovigo kaj produktado, kaj estis nomataj de la lastaj “homoj bonvenaj al ni”.

Sub la venenado de la kontraŭ-revolucia reviziisma eduka linio en la pasinteco, nemalmultaj instruistoj el la vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj kaj oficistoj, kiuj estas kreantaj eksperimentan agrokultivejon de eduka revolucio sur la bordo de Bojang-lago en Gianghi-provinco, havis ŝultrojn tamen ne povis vektporti kaj havis manojn tamen ne povis labori. Hodiaŭ, sub la direktado de la proletara revolucia linio de nia granda Partio kaj de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj sub la gvidado de la laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento, ili starigis eksperimentan agrokultivejon de eduka revolucio penlaborante sub la blua ĉielo kun piedoj en koto sur dezerta lagotero. Unuafoje en sia vivo ili konstruis per siaj manoj vicon post vico da domoj kaj elkulturis multajn virgajn ter-

pecojn. Tie ili estas samtempe instruistoj kaj studentoj, samtempe mensaj laborantoj kaj fizikaj laborantoj. Multaj instruistoj diris kun profunda sento: "En la pasinteco, agante laŭ la erara linio, ni eraris en ĉio, kaj havante eraran ideologion, ni povis sukcesi en nenio. Hodiaŭ, la revolucia linio de Prezidanto Maŭ montris al ni intelektuloj brilan perspektivon, kaj la firma gvidado de la laborista klaso malfermis al ni vastan mondon!"

Antaŭen marŝas Kinghua-universitato, antaŭen marŝas ĝiaj revoluciaj instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj kaj ankaŭ antaŭen marŝas la tuta batalantaro de la unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso sub la gvido de la Centra Komitato de la Partio.


Dum la pasinta unu jaro, la klasa batalo en Kinghua-universitato estis akra kaj komplika. Sed sub la intima prizorgado de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj sub la direktado de lia granda instruo, ke **"samtempe la laborista klaso devas ankaŭ senĉese altigi sian politikan konscion en batalo"**, la laboristoj kaj batalantoj de la Popola Liberiga Armeo lernis unu de alia, batalis ŝultro-ĉe-ŝultre kaj grandpaŝe antaŭen marŝis sur la vojo de ideologia revoluciigo. Ili ne estis timigitaj

de la klasaj malamikoj, ne fleksiĝis sub la malfaciloj, ne ebriiĝis de venko, nek estis trafitaj de sukertegitaj obusoj, sed fariĝis ankoraŭ pli firmaj kaj vivecplenaj!

La unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso de nia lando sub la gvidado de la Centra Komitato de la Partio profunde komprenis el sia batala praktikado, ke ĉiu venko akirita en la pasinta unu jaro estas venko de Maŭzedongpenso, venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj la merito devas esti atribuita al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ.

Ĉiuj kamaradoj de la propaganda taĉmento firme decidis plie altigi sian konscion pri daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo, ĉiam esti fidelaj al la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ĉiam esti fidelaj al la ĉiamvenka Maŭzedongpenso kaj ĉiam esti fidelaj al la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, kaj kun la Komunista Partio de Ĉinio kiel la kerno kaj sub la gvido de la Partio, gvidi la vastajn amasojn de revoluciaj instruistoj, studentoj, oficistoj kaj laboristoj konduki la socialisman revolucion en la superstruktura sfero ĝis la fino kaj starigi propramane brilan proletaran edukon sistemon disradiantan per Maŭzedongpenso.

Revoluciaj instruistoj kaj studentoj de Kinghua-universitato venis al la Pekina Fabriko de Eksterordinaraj Ŝtaloj por partopreni fizikan laboron, kaj ricevi reedukon de la laborista klaso. Jen laboristo (la dekstra) donas lecionon al ili antaŭ ŝtala fandforno.



Remuldi Intelektulojn laŭ la Fizionomio de la Laborista Klaso

JE la 27-a de julio de la pasinta jaro, la unua laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en nia lando, organizita de la laboristaro kaj PLA de nia ĉefurbo laŭ la batala alvoko de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, marŝis grandioze en Kinghua-universitaton de Pekino. Post tio, en diversaj lokoj de la tuta lando multaj laboristaj kaj PLA-aj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso iris unu post alia en diversajn sferojn de superstrukturo por gvidi tie la taskon de batalo, kritiko kaj reformo. Ĉisube estas kelkaj kortuŝaj rakontoj pri la gvidado de la laborista klaso de nia lando al batalo, kritiko kaj reformo en la sferoj de superstrukturo.

TRANSGRIMPI MONTOJN POR DESEJNI PLANON

Por unuigi ĉirkaŭ si kaj eduki la intelektulojn kaj konduki ilin sur la larĝan vojon de servo al la proletara politiko, la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en la Anŝan-a Projekta Instituto de Minejo organizis projektan grupon de "triflanka kombiniĝo" kun la laboristoj kiel la gvida forto kaj kun partopreno de revoluciaj kadroj kaj revoluciaj intelektuloj. Tuj post la fondiĝo, la grupo ricevis gravan batalan taskon

ellabori planon de kompleta konstruado de sistemo de vosto de fermino.

Sub la gvido de la laborista propaganda taĉmento, la inĝenieraj teknikistoj en la projekta grupo eliris el la domo de la instituto kaj venis al la konstruejo. Kelkaj el ili ĉirkaŭis geografian karton, faradis sur ĝi jen strekojn jen cirklojn kaj granda kvanto da agroj estis tiel enstrekita. Tuj sekve, ili laŭ sia malnova kutimo ekfoliumis malnovajn projektajn materialojn, sternis paperojn kaj komencis projektadon.

La estro de la projekta grupo Hu Kingjang, veterana laboristo pli ol 50-jara, apude staranta, rimarkis tion, kaj ju pli li cerbumis, des pli li sentis, ke ĝermas io neĝusta. Li pensis en si: Ĉu oni ne okupos vane kelkcent hektarojn da bonaj kampoj laŭ tia projektado? Kvankam tiuj projektistoj eliris el la domo kaj havas varman fervoron, tamen la venena influo de la reviziisma projekta linio en ilia cerbo ankoraŭ ne estas komplete eliminata. Kaj ekdiris kamarado Hu: "Ni absolute ne devas iri la antaŭan malnovan vojon, kiel la reakciaj 'specialistoj' kaj 'aŭtoritatuloj' faris en la pasinteco, anstataŭ strebi al racieco ili preferas senpenecon kaj nur ĉasas por si specialistiĝon kaj famiĝon. Hodiaŭ, Prezidanto Maŭ konfidis al ni la potencon de projektado, ni absolute ne devas iom neglekti."

La koraj vortoj de la veterana laboristo profunde edukis la projektistojn kaj ili kun la laboristoj komencis longan iradon por fari enketon kaj esploradon. Sur la vojo ili transgimpis montojn kaj travadis riverojn kaj faris samtempe diskuton, esploron kaj skizojn. Ili trapasis multajn dezertajn montojn kaj lokojn. La laboristoj marŝis per firmaj paŝoj tute senlace. Sed tia longa marŝado prezentiĝis tre granda provo por la inĝenieraj teknikistoj, kiuj konstante loĝis kaj laboris en domo. Iuj el ili, al kies piedoj aperis vezikoj, ne volis iri plu pro timo al malfacilo. Tion rimarkinte, la laboristoj ilin kuraĝigis: "Vera plano devas esti desegnita en batalo kontraŭ malfaciloj, kaj revoluciigo de ideologio povas esti efektivigita nur post hardiĝo en malfaciloj." Tion dirinte, veteranaj laboristoj transprenis iliajn pakajojn kaj metis ilin sur siajn ŝultrojn. Post pli ol dek fojoj de longa marŝado kaj detala enketo kaj esplorado de la natura geografio de tiu ĉi regiono,

ili havigis al si riĉan primaran materialon kaj elfaris pli ol dek projektojn. La laboristoj organizis ilin detale kompari la politikajn kaj ekonomiajn signifojn inter tiuj projektoj kaj peti opiniojn de la lokaj malriĉkmparanoj kaj malsuperaj mezkmparanoj kaj fine ili ellaboris racian projekton, kiu ne nur ne bezonis okupi agron, sed eĉ utiligis la vostan akvon por transformi sekajn kampojn en rizkampojn por levi produktkvanton de greno.

“FORPUŜI EL LA DOMO” KAJ “INVITI EN LA DOMON”

En aprilo de 1966, kamarado Vang Vengie, aĉetisto de iu unuo, venis ĝoje al la Botanika Instituto de Akademio de Sciencoj de Ĉinio kun tornistro da vegetalo. Li venis por peti la instituton analizi la vegetalon por determini, ĉu ĝi enhavas koloidon kaj valoras esti uzata kiel in-

Membro de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso laboranta en la Nordorienta Teknologia Kolegio kore interbabilas kun revoluciaj instruistoj kaj studentoj.





La laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso laboranta en la Sesa Mezlernejo de Gingoŭ, Liaŭning-provinco, detruas energie la reviziisman edukan linion kaj komandas per Maŭzedongpenso la instruadon. Jen kamarado laboristo donas lecionon pri fundamentaj scioj pri industrio en ligo kun praktiko.

dustria krudmaterialo. Sed iu enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon de la instituto diris malvarme: “Kion valoras analizi tion? Oni ne povas preni ĝin kiel objekton por scienca esploro, nek kiel temon por skribi disertacion.” Ricevinte rifuzon, Vang Vengie estis tre kolerigita.

En septembro de la pasinta jaro, la laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso venis al la botanika instituto kaj likvidis la absolutan superregon de la burĝaraj intelektuloj. Informiĝinte pri tiu ĝojiga novaĵo, Vang Vengie denove venis al la botanika instituto kun la vegetalo. En tiu tempo, iuj ankoraŭ opiniis kiel antaŭe ke “determini tian vegetalon havas nenian valoron”. La propaganda taĉmento tuj akre konsciis en tio, ke la venena influo de la kontraŭrevolucia reviziisma scienc-esplora linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki ankoraŭ ne estis plene eliminata. La vegetalon akcepti aŭ ne, estas problemo ne bagatela, sed koncernanta al kiu oni servas en scienca esplorado kaj kian linion oni plenumas.

Tuj prenante tiun problemon kiel temon, la propaganda taĉmento organizis studrondon de

Maŭzedongpenso en la tuta instituto por disvolvi debaton. Unue ili invitis kamaradon Vang Vengie rakonti al la studrondo, kiel li estis forpuŝita de la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon de la botanika instituto, kiel li, por la socialisma konstruado de la patrio, gustumis per sia buŝo tiun vegetalon por certiĝi, ĉu ĝi havas koloidon, kaj kiel li pro ties veneno ricevis ulceron de buŝo. La nobla kvalito de kamarado Vang Vengie en servo al la revolucio donis profundan edukon al la aŭskultantoj. Sekve, prenante la agon de la enpartia potenctenanto iranta la kapitalisman vojon de la instituto kiel ekzemplon, la propaganda taĉmento iniciatis fortan kritikon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma scienc-esplora linio de la granda renegato Liu Ŝaŭki, tiel ke ĉiuj klare vidis, ke tio, kion distrumpetis la granda renegato Liu Ŝaŭki, ja celis puŝi la vastan intelektularon en la reviziisman senelirejon de ĉasado de famo, profito kaj specialiĝo, kaj ke revoluciaj sciencistoj kaj teknikistoj devas konscie elimini venenan influon de reviziismo kaj transmeti sian starpunkton al la flanko de servado al la proletara politiko, al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj al la socialisma konstruado.

Kiam leviĝis la nivelo de ilia konado, ĉiuj ĝoje akceptis Vang Vengie en la laboratorion. Post kemia analizo estis certigite, ke tiu vegetalo efektive enhavas koloidon. Kamaradoj de la botanika instituto iris el la laboratorio, venis kun Vang Vengie al la Pekina Prestinktura Fabriko, kaj sub la forta subteno kaj fervora helpo de tieaj laboristoj fine sukcesis fari el la koloido entenata de tiu vegetalo novan industrian krudmaterialon tre utilan al la prestinktura industrio de nia lando.

DEFROTI "RUSTON"

En la pasinteco Janĉeng-a Mezlernejo de Giansu-provinco estis nigra "eksperimenta kampo" por antaŭenpuŝo de la feŭdisma, kapitalisma kaj reviziisma eduka linio. Veninte al la lernejo,

la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso, sub la gvido de la Partio, gvidis la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn disrompi la katenon de la reviziisma eduka linio kaj, laŭ la instrukcio de "la 7-a de majo" de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, pogrupo kaj laŭvice lerni industriajn kaj agrikulturajn laborojn kaj militajn aferojn kaj humile akcepti reedukon de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

En lernado de industria laboro, lernanto Lu Ĉongŝan spertis rigoran provon. Li opiniis, ke tuj post alveno al la fabriko li komencos lerni manipuli maŝinon. Sed, ekster lia atendo, la veterana laboristo asignis al li la taskon defroti ruston. Kun malplezuro li pensis en si: Kion mi povos ellerni farante tian mekanikan movon de la mateno ĝis la vespero?

La laborista kaj PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso laboranta en Kinghua-universitato decideme efektivigas la politikon de Prezidanto Maŭ pri kadroj kaj gvidas kadrojn partopreni fizikan laboron en kamparo, por ke ili ricevu reedukon en arda batalo.



En la komenco, li laboris sindevice, opiniante ke la veterana laboristo eble lasos lin labori ĉe maŝino post kelkaj tagoj. Sed pasis unu tago, du, tri, . . . kaj seninterrompe venadis rustaj objektoj. Kiam unu peco estis senrustigita, alia jam atendis lian frotadon. Sed la veterana laboristo tute ne parolis pri ŝanĝo de lia laboro. Malgranda Lu iom malpacientiĝis kaj pensis, ke li venis ja por lerni industrian laboron sed ne por servi kiel laboristo. Kial oni ĉiam lasas min fari tian laboron? Fine, li ja ne povis plu reteni sin kaj rekte petis pri ŝanĝo de laboro.

La veterana laboristo travidis la penson de malgranda Lu. Post la laboro li faris intiman interparolon kun malgranda Lu. Li diris: “Mi laboris en la fabriko jam pli ol dek jarojn kaj iuj kamaradoj eĉ pli longe ol mi, tamen ĝis nun ni ĉiam okupiĝas pri rustforigo kaj neniam petis pri ŝanĝo de laboro. Kiu plenumu tiun laboron, se vi ne volas kaj ankaŭ aliaj ne? Tio ja estas labordivido en revolucio!” Ĉiu vorto de tiuj lakonaj frazoj frapis la koron de malgranda Lu. En lia cerbo disvolviĝis batalo! Li pensis: Kial, la saman laboron, kamaradoj laboristoj povas diligente kaj konscie fari dekon aŭ dekojn da jaroj, dum mi jam ne volas fari plu nur post kelkaj tagoj? Ripetade ekzamenante sin per la instruoj de Prezidanto Maŭ, li venis al la kono ke **la laborista klaso estas la plej malproksimvida, plej malegoisma kaj plej ĝisfunde revolucia**. Dume li mem ankoraŭ ne forigis sian gravan mienon de mezlerneja lernanto. Pro tio li sentis honton kaj maltrankvilon. De tiam, li faris decidon: antaŭ ĉio lerni de la laboristoj en lernado de industria laboro, respekte preni la laboristojn kiel siajn instruistojn kaj konscie persisti en defrotado de rusto.

Nun, kiam aliaj demandis malgrandan Lu pri lia rikolto en lernado de industria laboro, li ĉiam ĝoje respondis: “La rikolto ja estas tre granda! Mi ne nur defrotis ruston sur fero, sed, pli grave, la ruston en mia ideologio dank’ al la helpo de kamaradoj laboristoj.”

“DEK JAROJ” KONTRAŬ “TRI MONATOJ”

La Mikrobiologia Instituto de Akademio de Sciencoj de Ĉinio trovis novan metodon por ekstrakti glikozon. La ĝojiga novaĵo rapide disvastiĝis.

La nova metodo estis trovita de esploristo de la instituto Fang Jiĉeng sub la helpo de laboristoj. Ekde 1954 Fang Jiĉeng jam komencis la esploradon

de nova metodo por ekstrakti glikozon. Sed en tiu tempo, lia celo de esplorado estis verki “superan” disertacion por gajni titolojn de “specialisto” kaj “aŭtoritatulo”. Fermante sin en laboratorio, li apartigis sin tute de la praktiko kaj nenion atingis dum dek jaroj. Post sia eniro en la mikrobiologian instituton, la propaganda taĉmento sekvis la instruon de Prezidanto Maŭ “... se la intelektuloj ne kombinas sin kun la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, ili sukcesos en nenio”, kaj sendis Fang Jiĉeng en fabrikon de glikozo por ke li tie ricevu reedukon de la laboristoj kaj daŭrigu sian esploradon de nova metodo de ekstrakto de glikozo kune kun la laboristoj.

Foje, kamaradoj de la “Avangarda Higiena Sekcio Tutkore kaj Tutanime Servanta al la Popolo” de ĈPLA venis al la fabriko por fari raportojn. Ili rakontis, ke antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio malsanaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj urĝe bezonis glikozon, sed sub la regado de la kontraŭrevolucia reviziisma scienc-esplora linio de Liu Ŝaŭki la esplora laboro pri ekstrakto de glikozo akiris nenian progreson. Informite pri tio, la vastaj amasoj de laboristoj flamis de indigno kaj firme esprimis: “Ni laboristoj havas noblan kaj firman volon nepre per efektiva agado forte kritiki la reviziisman scienc-esploran linion de Liu Ŝaŭki kaj dediĉi nian forton al pliigo de produktado de glikozo.” La forta klasa sento de senkompara malamo kontraŭ la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj senkompara amo al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, montrita de kamaradoj laboristoj, donis al Fang Jiĉeng tre vivan lecionon de eduko pri klasoj. Li pensis, ke ankaŭ li devenas de suferplena familio, sed kial estas tiel malsama la penso inter li kaj la kamaradoj laboristoj? Li fine venis al la kono, ke sub la veneno de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki li jam suriris danĝeran vojdon de ĉasado de personaj famo kaj profitoj. Li decidis sekvi la instruojn de Prezidanto Maŭ, serioze akcepti reedukon de la laborista klaso, ĝisfunde remuldi sian malnovan ideologion kaj entrepreni sciencan esploradon por la revolucio.

Ekde tiam, li batalis tagnokte kune kun la kamaradoj laboristoj en laborejo. En la kuna batalado, li prenis laboristojn kiel siajn instruistojn, humile akceptis iliajn helpojn, kaj post penado de tri monatoj fine eltrovis sukcese novan metodon por ekstrakti glikozon venkinte malfacilojn unu post alia.

Ŝanĝiĝo de Insularo

VIZAGE al Liaŭdong-duoninsulo de nia lando estas Ĉanghaj-gubernio, kiu konsistas el dekoj da insuletoj. Kaj la plej granda insulo en Ĉanghaj-gubernio estas nomata Daĉangŝan, kaj sur ĝi troviĝas Ĝanggiagoŭ-produktgrupo, kiu komplete ŝanĝis sian postrestigintan fizionomion alte tenante la flagon “**lerni de Daĝaj en agrikulturo**”.

La grupo situas ĉe la orienta fino de Daĉangŝan-insulo. Tie antaŭe estis loko plena de kalvaj montoj kaj ŝtonoj, kaj akvo estis kara kvazaŭ oleo, tiel ke cirkulis la jena popolkanto:

*Ĝanggiagoŭ — jen mizera kaj malriĉa monta
valo:*

*Ĉiujn ŝtupkampojn ĝiajn povas tuŝi vent' sen baro.
Kvazaŭ oleo karas dum sekeco akv' sen salo.
Sub unu ŝtormo ruiniĝas plene la plantaro.*

En antaŭenruliĝado de la potenca torento de la Granda Proletara kultura Revolucio, al tiu ĉi insulo okazis granda ŝanĝiĝo. Sekvante la instruojn de Prezidanto Maŭ “**sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo**” kaj “**malriĉeco igas aspiri al ŝanĝo, entreprenado kaj revolucio**”, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la grupo venkis malfacilon post malfacilo kaj ŝanĝis la malriĉan insulon en la riĉan post kelkjara peniga luktado. En 1967, Ĉangŝan-insulo la unuan fojon en sia historio efektivigis memprovizon en greno kaj legomoj. Kaj en 1968, ĝi denove batalakiris grandan riĉrikolton de greno, kaj la unuan fojon vendis al la ŝtato sian superfluan grenon.

Ja ne estis glate, ke Ĝanggiagoŭ-produktgrupo persiste iris la vojon de Daĝaj.

Post la Liberiĝo, sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, ĝi suriris la larĝan vojon de kooperigo kaj komunumigo. La fervoro de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj iri la socialisman vojon kaj ilia forta deziro urĝe postuli ŝanĝon de la postrestiginta fizionomio de la insulo jam manifestiĝis en la klasbatalo kaj la produkta batalo. Sed, kaŭze de la ĝenado de la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki, parto da kadroj kaj komunumanoj de tiu grupo havis ideon de “kvin dependoj”, nome, manĝi grenon depende de la ŝtato, manĝi legomojn depende de la kontinento, elspezi depende de la fiŝkaptado, konstrui depende de pruntepreno kaj militi depende de la armeo. Tial, preskaŭ ĉiuj fortaj laboruloj de la tuta grupo estis asignitaj por fiŝkaptado, dum la virinoj kaj ceteraj malfortaj laboruloj por agrikulturado. Rezulte, la terkulturo estis kondukata tre fuŝe, kaj la produktkvanto estis tre malalta. Kaj en plejparto da tempo de ĉiu jaro la grupo manĝis la grenon venditan de la ŝtato. Tiel, ĝi fariĝis la fama grenmanka grupo en Ĉanghaj-gubernio.

En 1966, la flamanta fajro de la Granda Proletara Kultura Revolucio propramane bruligita de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ envolvis ĉiujn limregionojn kaj insulojn de nia patrio. Strikte sekvante la grandan strategian dispozicion de Prezidanto Maŭ kaj kompakte ligante kun la praktiko de klasbatalo kaj batalo inter la du linioj sur la insularo, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝanggiagoŭ-produktgrupo profunde kaj longdaŭre disvolvis revolucion am-



Observante la instruon de Prezidanto Maŭ “sinprepari kontraŭ miliĉo, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝanggiagoŭ-brigado hakis monton por konstrui kampojn kaj ŝanĝi la postiĝintan fizionomion de la insulo.

san kritikadon, forte malkovris kaj kritikis la kapitalisman direkton plenenergie antaŭenpuŝitan de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Nordoriento kaj Liaŭning-a regiono, kiaj “plivastigo de parceloj por privata uzado kaj de liberaj merkatoj, pliigo de etaj entreprenoj memrespondecaj pri la propraj profitoj aŭ perdoj, kaj fikso de produkta kvoto bazita sur familia mastrumado”, “mono en komando”, “preferi monon ol grenon”. En la kunvenoj de viveca kaj forta revolucia amasa kritikado multaj maljunaj malriĉkamparanoj rememoris la tragikan historion, ke en 1947 la kuomintanga reaktularo blokadis la insularon, kaj la greno ne povis esti enportita, tiel ke mortis pro malsato kelkcent klasaj gefratoj. Pere de la rememoroj pri tiuj dolorplenaj historioj kun sango kaj larmoj, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝanggiagoŭ estis profunde edukitaj. Ili ĉiuj opiniis, ke niaj maraj insularoj estas la pordoj de la patrio kaj la plejfronto

kontraŭ imperiismo kaj reviziismo, kaj ke ili prenas sur sin la sanktan taskon defendi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la grandan patrolandon. Se ni ne multe produktas kaj rezervas grenon, sed dependas de la kontinento, do en la pacaj tagoj ni pliŝarĝos la ŝtaton, kaj en tempo de militado ni renkontos malfacilojn en grena provizo kaj tio rekte portos malutilan influon al la venko de batalo. La revolucia amasa kritikado multe levis la klasan konscion de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la grupo kaj akcelis ilian revoluciigon en ideologio. La spirito turniĝis en materion. En la batalo por transformi la naturon ili disvolvis gigantan forton.

Disvolvante la revolucian spiriton de la proletaro timi nek malfacilojn nek morton, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj konkeris malfacilojn unu post alia, kaj akiris venkojn unu post alia.

Ekspluati kampojn sur mara insulo estis tre malfacila. Ĉi tie malmultis grundo, kaj multis ŝtonoj, tiel ke post la forigo de ŝtonoj oni devis plenigi la kavojn per tero. Por solvi la malfacilon, ili do prenis teron de la loko kie oni neniel povis kulturi plantojn, kaj de tie ili korbojn post korboj vektportis teron en riĉrikoltajn kavojn, kaj jaron post jaro ligis tiujn kavojn en liniojn kaj plivastigis tiujn liniojn en parcelojn, kun la celo profunde plugi la kampojn kaj reformi la teron. Fosi kavojn sur la insulo ankaŭ estis malfacila laboro; kiam la pioĉo tuŝis la malmolan teron, ĝi sparkis kaj paralizis la brakojn pro tremo. En la plej malfacilaj horoj,

la malsana veterana gruestro Ĝang Kiju persistis en la laboro kaj per tio donis bonan ekzemplon por la komunumanoj. Eĉ la pli-ol-60-jara avino Vang Huanĝi kiu ĝuas " kvin garantiojn " petis iri sur montojn por plenigi la kampojn per kelkaj korboj da tero, aŭdinte, ke oni konstruas riĉrikoltajn kampojn. La komunumanoj konsilis al ŝi ripozi, ŝi tamen diris: " Se mi ne havas sufiĉan forton por svingi la pioĉon, mi povas forpreni ŝtonojn kaj ŝoveli teron en korbojn. Ĉiuj havas sian devon por respondi la grandan alvokon de Prezidanto Maŭ ' **sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo** ' . "

Por plivastigi la agron kaj pli-multe produkti grenon, en novembro de la pasinta jaro la gvidanta personaro kaj la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de la grupo decidis, sub la bonega situacio de celebrado de plena ruĝiĝo de la lando pro la fondiĝo de revoluciaj komitatoj, dishaki Nanŝan-monton de la grupo por konstrui ĝin en agron kaj per tiuj praktikaj agoj festi la grandan venkon de la Granda Proletara Kultura Revolucio. Nanŝan-monto estas plena de ŝtonoj miksitaj kun argilo. Dum vintra glaciĝo, ĝi fariĝis kvazaŭ ferbetono. Kiam oni pioĉis ĝin, la pioĉo postlasis nur unu blankan strekon. En tia cirkonstanco, ili iom post iom ĝin translokigis per la montotrans-

lokiga spirito de Malsaga Avo. Ĉu viroj aŭ virinoj, ĉu junuloj aŭ maljunuloj, ĉiuj en la tuta grupo laboregis dudek tagojn sur Nanŝan-monto kaj fine ebenigis ĝin spite la frostan venton penetran ĝis la osto, kaj per tio konstruis pli ol ses muojn da agro.

Post peniga luktado dum pli ol du jaroj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Ĝanggiagoŭ-produktgrupo entute fosis pli ol 33,000 riĉrikoltajn kavojn. Sur la bazo de solvo de agrara problemo ili ankaŭ mobilizis la komunumanojn multe kolekti sterkon, multe kulturi altpro-

Utiligante laborpaŭzon, PLA-ano subtenanta agrokulturon propagandas la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ " unuigu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn " al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj.



duktajn plantaĵojn kaj energie entrepreni sciencajn kulturadon de kampoj, tiel ke la produktkvanto de greno kreskis jaron post jaro. La pomua produktkvanto leviĝis de malpli ol 200 ĝinoj ĝis pli ol 500 ĝinoj. La totala produktkvanto de greno en 1967 jam atingis 71,000 ĝinojn, kaj la grupo la unuan fojon efektivigis la grenan memprovizon. Kompare kun tiu en 1967, la produktkvanto en 1968 pliiĝis je 23%. Ricevinte la riĉan rikolton, la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj dankis al Prezidanto Maŭ, kaj akirinte pliprodukton, ili ne forgesis pri subteno al la monda revolucio. Laŭ la plano la ŝtato ne postulis ke ili vendu la superfluan grenon, tamen ili vendis pli ol dek mil ĝinojn da greno al la ŝtato.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio, la milica organizo de Ĝanggiagoŭ-produktgrupo pli firmiĝis kaj grandiĝis ol iam ajn antaŭe. Sur la insulo, ĉiu familio estas gardejo, dum ĉiu estas gardstaranto. Ili diris kun heroeco: "Tute egale, ĉu la imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj venas de la ĉielo aŭ surrampas de la maro, ni certe ekstermos ilin firme, ĝisfunde, tute kaj komplete, kaj konstruos la insulon en ferŝtalan Grandan Muron per Maŭzedongpenso."

Sur ĉiu insulo de nia patrolando ĉie estas aranĝitaj embuskejoj kaj kaptiloj por ekstermi la malamikojn. Se imperiismo, reviziismo kaj reakciularoj de diversaj landoj altrudos militon al la ĉina popolo, ilin atentos nur komplete fiasko.

Maljuna malriĉkamarano instruas intelektajn gejunulojn pri produktaj scioj.



En la Sezono de la Laminaria Rikolto



La Revolucia Komitato de la Tria Akvoprodukta Kulturejo de la urbo Ljuda ĉiam metas la vivan studon kaj vivan aplikon de verkoj de Prezidanto Maŭ en la unuan lokon super ĉiuj aliaj laboroj. Jen la gvidanta grupo de la kulturejo estas en studado.




El laminario oni povas ekstrakti jodon kaj aliajn substancojn krom preni ĝin kiel manĝaĵon. En la laboratorio de la Ljuda-a Fabriko de Sinteza Utiligo

En la tagoj de riĉrikolto ĉie sur la bordo de la kulturejo estas sunseki-gataj laminarioj. ◀

Uzado de enaera kabla vojo por transporti lamina-
cion multe reduktas la pezan
fizikan laboron al la labo-
ristoj. ▶


Aktivulino de viva studo
kaj viva apliko de verkoj
de Prezidanto Maŭ kaj
vicestrino de la kultureja
revolucia komitato ka-
maradino Sun Gjuhiang
(maldekstre) laboras

▼ kune kun laboristoj.





Reveno plensargite kun rikoltaĵoj



Laboristoj rikoltas laminarion.

Riĉa Rikolto de Laminario

LJU DA

ESTIS rikolta sezono de laminario, kiam ni venis al la Tria Ljuda-a Akvoprodukta Kulturejo. Sur la vasta kaj kvietaj maro navede glitis tien ĉi tien boatoj plene ŝarĝitaj per laminario, kaj per helpo de la enaera kabla vojo la laboristoj okupiĝis pri transportado de laminario al la bordo. Baldaŭ la tuta marborda etendaĵo fariĝis plena de laminario por sunsekigado.


Iu kamarado de la kulturejo diris al mi, ke antaŭ la Liberiĝo nia lando ne produktis laminarion laŭ la marbordo. Tiu kulturejo stariĝis kaj disvolviĝis nur post la Liberiĝo.

La laminario kreskas el siaj sporoj alkröiĝantaj al rokoj sub maro. En la komenco de kulturado de laminario nia lando uzis la metodon de "natura reprodukto per ŝtonĵeto en maron", nome: kiam sporoj de laminario maturiĝis, oni jetas ŝtonojn en la maron, por ke la sporoj alkröiĝu al la ŝtonoj kaj kresku per si mem. Maturan laminarion oni rikoltas subakve. En tia metodo laminario kreskas malrapide kaj maturiĝas malfrue, tial la produktokvanto estas tre malalta. En 1952, kiam sukcesis en eksperimentado nia nova metodo de kulturado de laminario, ni disvastigis

la novan metodon en diversaj lokoj, kaj la malnova metodo ĉesis esti uzata.

En la Tria Ljuda-a Akvoprodukta Kulturejo, la tuta procezo de kulturado de laminario laŭ la nova metodo estas ĝenerale dividita en kvar paŝojn, nome: kreskigo de plantidoj, divido de plantidoj, surmara flegado kaj rikoltado. En julio kaj aŭgusto ĉiujare, kiam sur laminario aperas sporujoj, laboristoj zorgas ke la sporoj estu eligataj en endoma akvobaseno, en kiu troviĝas speciale faritaj bambuaj aŭ lignaj tabuloj, al kiuj la sporoj povas alkrigiĝi. Post certa tempo oni transmetas en maron tiujn sporportantajn tabulojn por tie kreskigi plantidojn de laminario. Kiam la laminariaj plantidoj kreskis ĝis 6-7 centimetroj, oni komencas la procedon de plantid-apartiĝo, t. e., transplanti apartigitajn plantidojn en maron. Per tiu metodo sub bona prizorgado, laminario povas ricevi sufiĉajn sunradiojn kaj nutradon, kaj ĝi ne nur maturiĝas frue, sed ankaŭ ĝiaj folioj estas pli larĝaj kaj dikaj. Ĝenerale, ili povas

Riĉa rikolto de laminario estas akirita. Jen la sablejo de la marbordo pleniĝas de laminario por sekigado.



kreski ĝis longeco de 2-5 metroj kaj larĝeco de 20-30 centimetroj, kaj ankaŭ la rikoltado estas tre facila.

Sub la gvidado de respondeca kamarado de la nomita kulturejo, ni havis ŝancon rigardi la abundan rikolton de laminario sur boato. Sur la maro, ni vidis, ke estas multaj ŝnuroj longaj ĉ. 60 metrojn kaj naĝantaj en la marakvo per la helpo de multaj alfiksitaj malplenaj vitraj globoj. Ambaŭ finoj de la ŝnuroj estas respektive fiksitaj sur lignofostoj. La radikoj de laminario fiksiĝas sur tiuj ŝnuroj, kaj la folioj pendas suben al la marfundo. Por rikolti sufiĉas al la laboristoj nur tiri la ŝnurojn sur la boatojn, kiujn poste venigas al la bordo trenŝipo.

Kulturado de laminario ne estas laboro facila. De la transplanto de laminariaj plantidoj ĝis rikolto oni ankoraŭ devas fari detalan kaj zorgeman flegadon kaj sterkadon. Sekve la laboristoj ĉiam okupiĝas per intensa laboro de la mateno ĝis la vespero.

Kamarado respondecanta tie pri produktado diris al ni: En la Granda Proletara Kultura Revolucio, precipe de post la fondo de la revolucia komitato de la kulturejo en aŭgusto de 1968, la vastaj revoluciaj amasoj de tieaj laboristoj kaj oficistoj uzas en produktado sian revolucionan laborenergion vekitan en la granda kultura revolucio tiel ke la laminaria produkto en 1968 kreis la plej novan rekordon en la historio de tiu kulturejo. La publikigo de la Komunikado de la Plivastigita 12-a Plena Sesio de la 8-a Centra Komitato de la Partio multe stimulis ilian laborfervoron. Ĉiuj batalis kontraŭ la frosto kaj plenumis la taskon de plantid-divido por 1969 en nur 12 tagoj, t. e., 30 tagojn pli frue ol en la jaro 1968. Tio kreis favorajn kondiĉojn por batalakiri pli grandan riĉrikolton de laminario en 1969.

En la komenco ĉijare, kiam laminario jam kreskis ĝis longeco de ĉ. unu metro, subite furiozis plurfoje ventego, ekregis frosto kaj aperis glacia katastrofo senprecedenca en la lastaj pli ol dek jaroj. Sur la maro preskaŭ la tuta vitra flosilaro uzata en kulturado de laminario estis alfiksitaj al glacio. Tamen, en tiu ĉi serioza cirkonstanco, la laminari-kulturaj laboristoj armitaj per Maŭzedongpenso ne estis timigitaj de tiuj malfaciloj. Ili firme unuiĝis, turnis sian koron kaj forton al la sama celo, kaj fine disrompis la glacieron sur la maro, kiu minacis la kreskadon de laminario, tiel ke la laminario povis normale kreskadi.

Tie la plantado kaj produktado de laminario estas ankoraŭ en konstanta disvolviĝado.

Surmaraj Junulinoj

— Pri la kvin intelektaj junulinoj laborantaj sur la fiŝkaptaj ŝipo “3 · 8”

Sur Ĝangzi-insulo de Liaŭdong-duoninsulo de nia lando, cirkulas kortuŝaj rakontoj pri la kvin junulinoj laborantaj sur la oceana fiŝkaptaj ŝipo “3·8”.

I

Iutage de decembro 1968, venis al Ĝangzidaŭ-komunumo de Ĉanghaj-gubernio, Liaŭning-provinco, kvin junulinoj, kiujn varme bonvenigis la vasta amaso de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj de la komunumo, kvazaŭ siajn parencojn longe neviditajn. La junulinoj estas Gia Jinguang, Gi Gujing, Luan Ŝukun, Ŝi Ĵongĉun kaj Vang Gujhua, kiuj finis sian lernadon en pedagogia lernejo de la urbo Ljuda. Ili adiaŭis la grandan urbon kaj siajn familianojn kun la decidema volo fariĝi novaj kleraj fiŝistinoj kun socialisma konscio kaj transloĝiĝi fikse en la insulo kun malfacilaj kondiĉoj.

Post la alveno de tiuj kvin junulinoj al la insulo, kiel la unuan lecionon, la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj rakontis al ili la historion de la insulo kaj siajn familiajn historiojn. La tri generacioj de maljuna fiŝisto Li Hjueŝan estis kruele ekspluatataj kaj subpremataj de la granda fiŝkaptaj tirano de la insulo en la malnova socio. Liaj gepatroj mortis sub turmentado kaj liaj fratinoj devigite forfuĝis aliloken. Ekde la aĝo de 13 jaroj, Li Hjueŝan jam fiŝkaptis sur la maro. De la jarkomenco ĝis la jarfino, li luktadis kontraŭ la maro en ondegoj tagnokte. Tamen li ĉiam vivis mizeran vivon, kian priskribis la diro: “Kiu okupiĝas pri fiŝkaptado, mortas kun la tuta familio en malsato.” Aŭdinte la akuzadon de la maljuna fiŝisto kontraŭ la malnova socio plenan de sango kaj larmoj, la kvin junulinoj emociite diris kun larmoj: “Kvankam antaŭe ni ankaŭ sciis la amaron de senposedeco de regpotenco kaj la feliĉon de teno de regpotenco, tamen neniam ni tiel profunde tion sentis kiel nun.”

Ili decidis neniam forgesi la profundan, grandan malamon, kiun havas la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj kontraŭ la malnova socio kaj por ĉiam revolucii sekvante Prezidanton Maŭ.

Kiam la junulinoj ĵus venis al la insulo, la tieaj fiŝistoj intencis sendi ilin al la akvoprodukta plantejo de la komunumo. Sed la kvin junulinoj tion ne konsentis. Ĉar vidante ke virinoj sur la insulo tutjare fiŝkaptas por la revolucio sur ŝipoj fendante ondojn de la maro en vento, ili pensis en si: Ĉu ni intelektaj junulinoj el la urbo ne povas same bataladi sur la maro kiel ili? Cetere ili sentis, ke tiu vojo donas plej bonan ŝancon por hardi la revolucian spiriton timi nek penadon nek morton kaj starigi la proletaran mondkoncepton. La revolucia komitato de la komunumo subtenis ilian peton, postenigis ilin al la oceana motorizita velŝipo “3·8” kaj detale rakontis al ili la avangardan agadon de la unua ŝipestrino Ven Ŝuĝen, kiu gvidis aron da junulinoj krei la fiŝkaptan ŝipon “3·8” antaŭ 10 jaroj. La junulinoj estis tre kortuŝitaj de ŝia agado kaj esprimis, ke ili, same kiel Ven Ŝuĝen, fariĝos bonaj komunumanoj de la epoko de Maŭ Zedong.

Rapide disvastiĝis tra la insulo la novaĵo pri partopreno de la junulinoj en fiŝkaptado. Ilia spirito kuraĝi en sturmado kaj revolucio profunde impresis la vastajn fiŝistajn amasojn. Iuj virinoj faris por ili tuj en tiu nokto oleumitajn mantelojn. Estis ankaŭ avino, kiu al ili diris prenante iliajn manojn: “Knabinoj, estas ventego kaj ondegoj sur la maro kaj pro marmalsano vi ne povos manĝi dum sinsekvaj tagoj kaj eĉ vomos la tutan stomakon”, konsilante ke ili ne fiŝkaptu sur la maro. Tiam, utiligante la okazon, plenmano da klasaj malamikoj disvastigis la babilaĉon: “Virinoj sur la maro aŭ renversos la ŝipon aŭ kaptos neniun fiŝon!”

Malgraŭ ĉi tio, ne ŝanceliĝis ilia decido kapti fiŝojn en malproksima maro. Matene, ili vidis ke fiŝistoj forveturis sur dekoj da motorizitaj velŝipoj kaj tuj malaperis en la ondanta maro. Kaj kiam la fiŝistoj revenis, la ŝipoj estis jam plenaj de riĉa batalakiraĵo. Ĉio ĉi tio plifortigis la decidemon kaj memfidon de la junulinoj kaj multe kuraĝigis ilin veturi al la maro.

II

En la jaro 1969, kiam komenciĝis la batalado de printempa fiŝkapta produkto, kun profunda sento de senlima fideleco al Prezidanto Maŭ kaj kunportante en si la ruĝan trezoran libron, la kvin intelektaj junulinoj kuraĝe suriris oceanan fiŝkaptan ŝipon kaj komencis sian militiron al la maro.

Ĝuste en tagmezo ili ekveturis, kaj tre kvieta estis la senlima maro. La junulinoj estis tre viglaj sur la ŝipo, jen rigardante la maŝinon en la holdo, jen palpante la reton sur la ferdeko; ili kaj kantis kaj saltis, kaj ĉio estis tiom interesa por ili.

Sed, la vetero sur la maro estas tre ŝanĝiĝema. Posttagmeze subite blovis 5-6-gradaj ventego. Post nelonge la tuta maro bolis; muĝantaj ondegoj sinsekve ruliĝis al la pruo, impetis al la masto

kaj balais tra la poŭpo. Tiam la junulinoj ne povis plu stabile stari sur la ŝipo kaj iliaj koroj batis ĉiam pli forte kun la ondado de la maro. Iom poste, ili ĉiuj paliĝis kaj ŝvitis per malvarmaj gutoj kaj iuj eĉ ekvomis. Vidante tion, veteranaj fiŝistoj ripetade kuraĝigis ilin dirante: "Por konkuri la marmalsanon, vi devas vigligi vian spiriton kaj penu manĝi." La kuiristo de la ŝipo propramane portis al ili manĝaĵon kaj akvon. Sed flarante la odoron de manĝaĵo kaj fiŝo, ili vomis ankoraŭ pli forte. La kuiristo zorgeme diris al ili: "Por elteni la atakon de marmalsano, vi devas persisti en manĝado, eĉ se la vento kaj ondoj estas ankoraŭ pli grandaj."

El la junulinoj Gia Jinguang estis la plej turmentata de marmalsano. Ŝi daŭre vomis tri tagnoktojn sen momenta kvieto. La kvaran tagon, iom mildiĝis la vento kaj ŝi vomis ankaŭ malpli forte. En tiu momento, akra batalo aperis en ŝia penso. Ŝi pensis en si: Se mi ne laboros sur la ŝipo, mi ne trafus tian suferon. Ju pli ŝi pensis, des pli ŝi ĉagreniĝis. Kaj ŝi faris decidon en si, ke en ĉiu okazo ŝi ne plu laboros sur fiŝkapta ŝipo kaj tuj partoprenos la agrikulturan produkton, kiam la ŝipo revenos al la haveno.

Travidinte la penson de malgranda Gia, la veterana fiŝisto Liu Venli studis kune kun ŝi la grandan instruon de Prezidanto Maŭ "En tempo



Ven Ŝugen (la dua de maldekstre), estrino de la ŝipo "3.8", studas verkon de Prezidanto Maŭ kune kun intelektaj junulinoj Gia Jinguang (la unua de dekstre) kaj Gi Guj-jing (la dua de dekstre) kaj la nova ŝipestrino Gang Gianhua.

de malfacileco, ni devas vidi niajn atingaĵojn, devas vidi la lumon kaj devas levi nian kuraĝon”, kuraĝigis ŝin venki la marmalsanon kaj konduki la revolucion ĝis la fino. La intima zorgemo de veterana fiŝisto revokis en la memoron de malgranda Gia la jenan pasintaĵon:

La 5-an de marto, 1949, kiam la epokfara Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazis sub la persona prezido de nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ, t. e. tuj antaŭ la aŭroro de la venko de la revolucio de Ĉinio, naskiĝis malgranda Gia en iu revolucia familio. Esperante ke ŝi ĉiam revolucios laŭ la revolucia direkto montrita de Prezidanto Maŭ, ŝiaj gepatroj nomis ŝin “Jingguang” (renkonte al aŭroro). Kiam ŝi havis la aĝon de unu plena monato, ŝiaj gepatroj militiris kun ŝi suden trans Jangzi-riveron laŭ la batalordono de Prezidanto Maŭ, por ruinigi la dinastion de Ĉiang Kajŝek kaj liberigi la tutan Ĉinion. Post la Liberiĝo, ŝiaj gepatroj ofte edukis ŝin per heroaĵoj de revoluciaj martiroj. Antaŭ ŝia veturado al la insulo, ŝiaj gepatroj foje kaj refoje kuraĝigis ŝin tutkore iri la vojon de kombiniĝo kun la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, sekvi Prezidanton Maŭ daŭre revolucii kaj fariĝi daŭriganto de la revolucia afero de la proletaro. Rememorante tion, Gia Jinguang sentis, ke ŝi ŝanceliĝanta antaŭ la malfacilo tro vanigas la kulturadon faritan de Prezidanto Maŭ kaj la esperon, kiun havas sur ŝi la revoluciaj antaŭuloj kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tial malgranda Gia faris firman decidon nepre fariĝi mastro de la maro. Poste, kune kun siaj kunbatalantoj ŝi venkis la marmalsanon finfine. Kiam ili revenis al la insulo unuafoje kun fiŝoj de ili mem kaptitaj, la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj venis viziti ilin ĝojege. Ankaŭ la avino, kiu admonis ilin ne veturi al la maro, diris emociite: “Kvankam viaj vizaĝoj fariĝis sunbrunaj, tamen viaj koroj estas harditaj ruĝaj. Havante bonajn junulinojn kiel vin, ni fiŝistoj povas esti trankvilaj.”

III

Kiam la junulinoj iom post iom konis la karakteron de la maro, ili komencis lerni la teknikon de veturigo de motorizita velŝipo kaj fiŝkaptado. En praktika batalado ili profunde ekkonis, ke la procezo de ricevo de reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas procezo de eliminado de egoismo kaj starigo de kolektivismo.

Iun nokton, kiam Gi Gujĵing lernis direktadon, estis densa nebulo. La ŝipo perdis la vojon kaj

grundis. Tio forte maltrankviligis malgrandan Gi. Veterana fiŝisto diris al ŝi serioze kaj sincere: “Ne timu malsukcesojn, se vi volas fariĝi bona daŭriganto de la revolucio. Malsukceso estas la patrino de sukceso. Memoru la lecionon kaj vigligu vian gardemon, tiam ĉio estos en ordo.” Krome li kuraĝigis ŝin daŭre antaŭenmarŝi. Malgranda Gi estis tre kortuŝita. Aliffoje, kiam blovis 7-8-grada ventego sur la maro, la muĝantaj ondoj leviĝis alte kaj impetis furioze. Tiam la ŝipo de malgranda Gi ĝuste estis levanta la reton. Pro la ventego kaj ondegoj la ĵus levita reto ekglitis ree al la maro. Se oni ne ĝustatempe haltigus ĝin, ne nur ĝi estus ŝirita kaj forportita de la ondoj, sed ankaŭ la jam kaptitaj fiŝoj estus tute perditaj. En tiu kriza momento, iu veterana fiŝisto alsaltis kaj forte premis la reton per siaj piedoj por savi la kolektivajn posedaĵojn. Tiutempe, ondo impetis al la ŝipo kaj levis ĝin sur ondokreston. La veterana fiŝisto preskaŭ estis kuntrenita en la maron. En tiu momento, pro timo malgranda Gi faris unu paŝon retroe kaj ekpensis: “Kia danĝero estas! Kion fari se mi falus en la maron?” Sed ŝi pensis en si ankaŭ: Kial la veterana fiŝisto tute ne timis, kiam mi retropaŝis timeme, en tiu viv-morta momento? Ĉu la “alsalto” kaj “retiro” ne spegulis du malsamajn mondkonceptojn? Por la “kolektivo” la veterana fiŝisto ne timis morton, dum mi retroiris pro “egoismo”. Ĉu ne montriĝis en tio la influo de “filozofio de vivkonservo” de la granda renegato Liu Ŝaŭki? Pensante pri tio, malgranda Gi decidis ĉiam preni la “tri popularajn artikolojn” kiel spegulon kaj la veteranan fiŝiston kiel sian modelon por ĝisfunde transformi sian mondkoncepton.

Post kelkaj tagoj, oni denove levis la reton en ventego kaj ondegoj. La ŝipo tre forte balanciĝis. Firme apogante sin sur la ŝipflanko, malgranda Gi klopodis eltiri la reton per hoko por ĝin pendigi. Pro puŝo de ondo la reto subite subglitis. Tiutempe, la heroa figuro de la veterana fiŝisto, kiu piedpremis forglitantan reton, tuj aperis antaŭ malgranda Gi. Senhezite ŝi alsaltis kaj piedpremis la reton kaj finfine ŝi levis la reton post intensa batalado kune kun la veteranaj fiŝistoj samtempe alsaltintaj. Kiom ĝojis Gi Gujĵing, kiam ŝi vidis svarmon da saltantaj arĝente brilantaj fiŝoj en la reto.

Marnavigo dependas de la stiristo kaj revoluciado dependas de Maŭzedongpenso. La unuan ĝojindan paŝon sur la nova revolucia vojo jam faris la kvin intelektaj junulinoj, kiuj fiksloĝas sur fiŝkapta ŝipo por malproksima maro.

Rapide Kreskas la Vicoj de Inĝenieraj Teknikistoj de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko

“Ankoraŭ necesas havi altlernejojn — ĉi tie mi parolas ĉefe pri altlernejoj de naturaj sciencoj kaj inĝenierado. Tamen la lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado, proletara politiko devas esti metata en komandon kaj la vojo irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en trejnado de selektitaj laboristoj en teknikajn laborantojn devas esti prenata. Studentoj devas esti selektataj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kaj ili devas reiri al produkta praktiko post kelkvara studo en lernejo.”

Tiu ĉi instrukcio kun granda historia signifo donita de Prezidanto Maŭ en la 21-a de julio, 1968, lumigis, kvazaŭ brila lumturo, la direkton por la inĝenieraj teknikistoj de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko daŭrigi revolucion sub la diktaturo de la proletaro, kaj plue ŝanĝis profunde la fizionomion de la vicoj de inĝenieraj teknikistoj kaj teknika laboro de produkto de tiu ĉi fabriko: nombro da elstaraj laboristoj kaj laborist-teknikistoj fidelaj al Prezidanto Maŭ suriris la gvidan postenon kaj tenis produktan kaj teknikan regpotencon. El la 24 novaj specoj de preciza frotmaŝino kaj el la 4 specoj de preciza mezurilo urĝe bezonataj de la ŝtato kaj projektitaj kaj sukcese fabrikitaj en la lasta jaro de la fabriko mem, troviĝas 11 specoj de frotmaŝino kaj unu speco de mezurilo, kies precizeco kaj kvalito atingis aŭ superis la internacian progresintan nivelon. Kaj en la unua duono de la kuranta jaro, la tuta fabriko plenumis projektadon de 13 novaj specoj de produktaĵoj. Tia rapideco de disvolviĝo estas neniam trovita de post la fondiĝo de la fabriko. Tiuj ĉi novaj

specoj plejparte estas projektitaj ĉefe de la laboristoj kaj laborist-teknikistoj en kombiniĝo kun revoluciaj intelektuloj. Produktante la ebenan kaj cilindran frotmaŝinojn, la fabriko jam tute liberigis sin de fremdlandaj rutinoj, efektivigis impeton en projekta tekniko de maŝinoj kaj starigis serion da tute novaj produktaĵoj kun speciala stilo de nia lando.

DAŬRIGI LA REVOLUCION KAJ ANTAŬENMARŜON

La “vojo” irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko “en trejnado de selektitaj laboristoj en teknikajn laborantojn” konfirmita de Prezidanto Maŭ estas la vojo, laŭ kiu la laborista klaso kulturas siajn scienc-teknikajn laborantojn, okupas scienc-teknikan pozicion kaj rompas la regadon de burĝaraj intelektuloj, estas la vojo, laŭ kiu la laborista klaso remuldas per sia fizionomio la scienc-teknikajn laborantojn elkulturitajn de la malnovaj lernejoj kaj la tutan scienc-teknikan laboron por ke ĝi pli bone servu al la proletara politiko.

En la sfero de produkto kaj tekniko tre akre iras la batalo inter la du klasoj, du vojoj kaj du linioj. La burĝara ideologio pri ĉaso de famo kaj profito kaj ĝia laborstilo de “tri sinapartigoj” (de la proletara politiko, de la laboristaj kaj kamparanaj amasoj, de produkta praktiko) ĉiam atakas la laborist-teknikistojn. Se la burĝara ideologio ne estas kritikita, ĝi forlogos nombron da homoj. La laborist-teknikistoj de tiu ĉi fabriko komprenas, ke estas ne malfacile por laboristo

posedi teknikan teorion, malfacile estas sin protekti kontraŭ korodo kaj esti neniam influita. Firme sek-vante la instruon de Pre-zidanto Maŭ “la laborista klaso devas ankaŭ senĉese altigi sian politikan konscion en batalo”, ili ĉiam sin gardas kontraŭ la korodo de la burĝara ideologio, sin intensigas en remuldata de sia mondkoncepto por kon-duki ĝisfine la daŭran re-volucion sub la diktaturo de la proletaro.

Laborist-teknikisto k-do Vang Defa, kiun menciis la enketa raporto “La Vojo Irita de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko en Trejnado de In-ĝenieraj Teknikistoj”, daŭre restas modesta kaj singarde-ma, kaj konservas sian stilon de modesta viva-do kaj penema luktado kaj faras heroajn paŝojn de daŭra revolucio sub sia fera ĵuro “gajni gloron por Prezidanto Maŭ”. Dum la lasta jaro, alfrontante mal-facilon kiom ajn grandan, li tuj sentis sin centoble brava je ekpenso pri la konfido de Prezidanto Maŭ al la laborista klaso. Li ĉiam pensas: La vojo de revolucio estas tre

tre longa, ni laborista klaso devas peneme lukti por ĝi la tutan vivon kaj senĉese fari novajn kon-tribuojn por la popolo. En la pasinta jaro, apenaŭ li revenis de Pekino post revuado de la Nacia Festo, li ricevis novan batalan taskon partopreni en fabrikado de du grandaj precizaj ebenaj frot-maŝinoj urĝe bezonataj de la ŝtato. Nenion dirinte, li, kiel multaj aliaj maljunaj laboristoj, transloĝiĝis en la fabrikon, kaj ĉiam laboris kune kun la laboristoj kaj liaj vizaĝo kaj manoj ofte estis ole-makulitaj. Kie la maljunaj laboristoj renkontis malfacilojn, tien li iris helpi por solvi ilin. Kiam la laboristoj rimarkis, ke devas esti plibonigo en la projekto, Vang Defa tuj prenis kartonon kiel projektan platon kaj reviziis planon



Laborist-teknikisto Gu Kigong (la tria de maldekstre) laboras samtempe kiel instru-isto de la laborista universitato “21-a de Julio”, kaj li helpas lernantojn kun profunda proletara sentimento en posedo de scioj pri projektado.

ĉeloke kaŭrante sur la planko. Neniu frem-dulo rimarkis ke li estas ĉefa projektanto de tiu ĉi maŝino. Li eldiris la komunan komprenon de la tutfabrikaj laborist-teknikistoj: “Por ĉiam konservi la naturon de la laborista klaso, ni de-vas neniam sin apartigi de la proletara politiko, de la amaso kaj de la kolektiva produkta laboro.”

Laborist-teknikisto Ma Ginĵong kaj aliaj vete-ranaj laboristoj akceptis la batalan taskon projekti altprecizan grandan specialan frotmaŝinon de la ŝtato urĝe bezonatan. Por forte bati imperi-ismen, reviziismon kaj reakciularon, ili elmetis al si postulon pri la projekta rapideco: “Ju pli frue des pli bone, estas bone eĉ se ni finos la pro-

jektadon je minuto aŭ sekundo pli frue!” Ĉiuj laborantoj de la projekta grupo konscie restis en la fabriko post labortempo, ne ripozis en ferioj, kaj kiam ili renkontis malfacilon, ili studis la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. Rezulte de tio ili finis la projektan taskon kaj per 32 tagoj kreis la miraklon por filistroj neimageblan.

SENĈESE KRESKI EN LA Batalo

Sub la direkto de la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ, por konformigi sin al la bezono ke la laborista klaso okupas kaj transformas la tutan produkt-teknikan pozicion, la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko daŭre elektis kaj kulturis grandnombrajn laboristojn en teknikistojn. Kaj rapide kreskis tiu ĉi trupo en la batalado.

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ “**studentoj devas esti selektataj el la laboristoj kaj kamparanoj, kiuj havas praktikan sperton, kaj ili devas reiri al produkta praktiko post kelkvara studo en lernejo**”, ili fondis novtipan lernejon gvidatan kaj administratan tute de la laboristoj mem — la Laboristan Instituton “21-a de Julio”, selektis kaj sendis veteranajn laboristojn, kiuj havas profundan klasan sentimenton al Prezidanto Maŭ kaj sperton [el longtempa praktiko, en instituton por tie lerni, kaj per tio elkulturis nombron post nombro da teknikistoj de la laboristoj mem.

La 52 lernantoj de la unua grupo de la Laborista Instituto “21-a de Julio” venis de diversaj laborejoj kaj sekcioj de la fabriko inkluzive de diversaj laborspecoj kiaj torna, metala, rabota, freza, frota, elektra k. a., inter kiuj nemalmultaj estas kerna forto kun kompare alta konscio pri batalo inter la du linioj en diversaj laborejoj, sekcioj kaj produktgrupoj. Plimulto el la nunaj instruistoj de la instituto estas laboristoj kaj laborist-teknikistoj laborantaj sur la fronto de produkta batalo. Ili formis, kun revoluciaj intelektuloj havantaj praktikan sperton, lektoran grupon de “triflanka kombiniĝo”. Laborist-teknikisto k-do Vang Defa estas elektita kiel instruisto de la laborista instituto por esplori edukan revolucion. Sur la podio faras lecion ankaŭ iuj lernantoj, kiuj ankaŭ prenis sur sin laboron de direktanto en praktika instruado.


La Laborista Instituto “21-a de Julio” funkciis nur pli ol 9 monatojn, tamen ĝi jam manifestis la senliman vivipovon de la novtipa instituto

fondita per la penso de Prezidanto Maŭ pri eduka revolucio. La laboristoj, kiuj estis senigitaj je la rajto de eduko en la malnova socio, rigardas eniron en la instituton kiel batalon de la laborista klaso por okupi edukan pozicion kaj teni scienc-teknikan regpotencon. Ili lernis kun forta klasa sentimento kaj decidis gajni gloron por Prezidanto Maŭ kaj la laborista klaso. Ili diris: “Lernante en la instituto, ni laboristoj strebas nek al famo nek al profito, sed al elhako de vojo por eduka revolucio kaj al kontribuo por industria revolucio.”

Por ellerni bone, lernantinoj konfidis siajn infanojn al siaj parencoj, dum pliaĝaj lernantoj aranĝis, ke la gefiloj helpu ilin en ripetado de lecionoj. Lignaĵisto kamarado Li Jinhiang lernis antaŭe nur ĝis la kvara klaso de elementa lernejo kaj por li estas malfacile preni plumon pro kripliĝo de la dikfingro de la dekstra mano. Li skribis sur la unua paĝo de ĉiuj siaj kajeroj: “**Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon.**” La laboristoj-lernantoj de la instituto lernis kaj samtempe praktikis, kaj, sub la direkto de la laborist-teknikistoj, plenumis per tri monatoj la projekton de du novaj produktaĵoj urĝe bezonataj de la ŝtato. La rapideco de ekposedo de tekniko estas malfacile atingebla por ordinaraj superaj lernejoj.

Kaj krome, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ “**nia ĉefa metodo estas lerni militi en milito**”, la fabriko selektis nombron da veteranaj laboristoj kun alta klasa konscio kaj praktika sperto al la posteno de teknika laboro por kulturi ilin en teknikan kernan forton en praktiko.

Laŭ siaj propraj kondiĉoj, ĉiu laborejo lasis tiujn ĉi veteranajn laboristojn partopreni en projektado de novaj produktaĵoj kaj en scienc-teknika esplorado aŭ surŝultrigi alian teknikan laboron. Iuj veteranaj laboristoj estis selektitaj en siaj grupoj por respondeci pri teknikaj laboroj kiaj teknika servado, planado de novaj produktaĵoj, teknologia projektado kaj kontrolo de novaj produktaĵoj, kaj ili hardiĝas kaj kreskas sur la fronto de la produkta batalo. Iu laboristo, kiu finis nur la lernadon de elementa lernejo, estis “helpanto” de intelektuloj antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio. Post la publikigo de la brila instrukcio de Prezidanto Maŭ, li laboris kiel estro de lagra grupo de kabineto de scienca esploro. Ili kritikis la reviziisman linion kopii esplorajn temojn el fremdlandaj materialoj, fari eksperimentadon disde praktiko, kaj strikte kombinis sciencajn esploradojn



Laborist-teknikisto Vang Defa suriris instruan podion de laborista universitato.

kun produkta praktiko, tiel rompis la antaŭan sufokan atmosferon. Dum mallonga tempo de pli ol tri monatoj, la kamaradoj de la grupo sukcesis en multaj scienc-teknikaj esploroj kia grandrapideca statikprema lagro por 12,000 rivoluoj po minuto kaj per tio faris kontribuon al la socialisma konstruado.

TRANSFORMI INTELEKTULARON LAŬ LA FIZIONOMIO DE LA LABORISTA KLASO

Transformi intelektularon laŭ la fizionomio de la laborista klaso estas glora tasko staranta antaŭ la laborista klaso, kaj ankaŭ grava enhavo de okupo kaj transformo de produkt-teknika pozicio. Dum la lasta jaro, kun la vasta animo de **“la plej granda klaso en la historio de la homaro”** kaj la braveco **“liberigi la tutan homaron”**, la revoluciaj laboristoj kaj laborist-teknikistoj de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko unuigas, edukas kaj transformas la intelektulojn per Maŭzedongpenso, helpas ilin konkeri iom post iom seriozan

influon de la reviziismaj eduka linio kaj scienc-teknika linio kaj faris sian kontribuon por la proletara afero.

La pli ol ses mil revoluciaj laboristoj de la fabriko estas la ĉefa forto en reeduko al la intelektuloj. Kelkcent intelektuloj venis en diversajn laborejojn kaj grupojn por partopreni produktan kaj teknikan laboron. En unu grupon venis kelkaj intelektuloj, tie kelkdek veteranaj majstroj, kune kun ili, vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, faras revolucion amasan kritikadon, rakontas al ili sian suferplenan familian historion kaj faras al ili korverŝan interparolon. La laboristoj klare vidis kaj komprenis vivan penson de la intelektuloj, tial la reeduko estas trafa. La potenca ofensivo de proletara ideologio ĉiam tuŝas la sendependan regnon de la burĝara egoismo en la cerbo de la intelektuloj.


La laboristoj edukas la vastan amason de intelektuloj starigante ekzemplon per sia konduto senlime fidela al Maŭzedongpenso. En la komenco

de la kuranta jaro, kelkaj veteranaj laboristoj de la dua laborejo akceptis la taskon gvidi junajn intelektulojn projekti novan frotmaŝinon. Anstataŭ foliumi librojn aŭ citi materialojn, la veteranaj laboristoj unue gvidis ilin studi la instruon de Prezidanto Maŭ pri tutkora kaj tutanima servo al la popolo. Ili ne sinpartigis de praktiko por fari projekton, sed solide faris enketadon kaj esploradon kaj aŭskultis postulojn kaj opiniojn de uzantoj. Ili peneme laboris tage kaj nokte; iutempe, kiam ne troviĝis loko por dormi, la veteranaj laboristoj gvidis ilin tranokti en stacio. Renkontinte malfacilon, la veteranaj laboristoj ne povis endormiĝi, ellitiĝis kaj ripetade studis instruojn de Prezidanto Maŭ por kuraĝigi la batalvolon. Profunde kortuŝite, la junaj intelektuloj diris: "La senbrua agado de la veteranaj laboristoj ja estas la plej bona klarigo kaj apliko de Maŭzedongpenso, plej bona kritiko kontraŭ la reviziisma projekta linio kaj plej bona eduko por ni." Kun la veteranaj laboristoj kiel ekzemplo ili aktive disvolvis sian iniciativon, antaŭ-

date plenumis la taskon de projekto kaj fabriko de tiu ĉi nova frotmaŝino kaj kreis novan rekordon.

Prezidanto Maŭ instruas: **"Inter ili certe estas iuj, kiuj estas bonaj en kombiniĝo kaj farintaj ian inventon aŭ kreon, kiujn oni devas priraporti kaj kuraĝigi."** Al la eraroj kaj mankoj de la intelektuloj, la laboristoj donis varman helpon kaj seriozan kritikon, kaj al ilia progreso la laboristoj konfirmis kaj kuraĝigis ilin daŭre progresi. En la pasinta jaro, la revoluciaj laboristoj de tiu ĉi fabriko elektis 20 intelektulojn, kiuj kompare pli bone kombiniĝis kun la laboristoj en laborado, kiel "laborantojn kun kvin bonoj" de 1968 en la tuta fabriko. Krome la fabriko alprenis diversajn formojn kiaj kunveno por studi kaj apliki Maŭzedongpenso, kunsido, nigratabula gazeto k. a. . Per tio la fabriko starigis progresintan ekzemplon en akcepto de reeduko, kio multe kuraĝigis la vastan amason de intelektuloj kiuj decidis fariĝi intelektuloj vere bonvenaj al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

Laborist-devena juna teknikisto (la meza) profundigis en laborejon, ne apartigante sin de la amasoj kaj de laboro, kaj kontrolas la kvaliton de produktaĵo kune kun laboristoj.



FINKONSTRUIĜIS LA HONGŜI-A ŜTALFABRIKO

Sub la direkto de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la laboristaro de Gilin-provinco persistas en irado de la vojo de **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”** kaj sukcese finkonstruis sendependan kompletan malgrandan ferŝtalan kombinumon, nome la Hongŝi-an Ŝtalfabrikon de Gilin-provinco, konsistantan el jenaj partoj: minekspluatado, ercoselektado, brulkunigado, koaksigo, gisado, ŝtalfandado kaj laminatado.

La konstruado de tiu ĉi malgranda ferŝtala kombinumo estas komencita en 1958 laŭ la granda instrukcio de Prezidanto Maŭ surbaze de la amasa fandado de fero kaj ŝtalo. Sed nelonge post la komenco, la konstruado estis ĉesigita pro ĉiaj ĝenoj kaj subfosoj de la kontraŭrevolucia reviziisma linio antaŭenpuŝita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en Gilin-provinco. En 1965, Prezidanto Maŭ elmetis la grandan alvokon **“sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo”**, kaj la vastaj amasoj de

revoluciaj laboristoj de la Hongŝi-a Ŝtalfabrika tuj vigliĝis kaj sinjetis en ardan tajdon de konstruado. En la Granda Proletara Kultura Revolucio, alte tenante la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj sub la helpo de la PLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en la fabriko, la revoluciaj laboristoj disvolvis potencon revolucian amasan kritikon, forte kritikis la reviziismajn nigrajn varojn kolportitajn de Liu Ŝaŭki kiaj **“sklaveco antaŭ fremduloj”** kaj rampismo kaj altigis sian konscion pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. Ili firme praktikis la **“Konstitucion de la Anŝan-a Ferŝtala Kompanio”** kaj la principon **“sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”** kaj senĉese akiris novajn venkojn en konstruado de la fabriko.

Stimulate de spirito de la Naŭa Kongreso de la Partio, la vastaj laboristaj amasoj de la Hongŝi-a Ŝtalfabrika batalis tage kaj nokte kun la revolucia spirito **“kapti ĉiun horon”**. Dank’ al la forta subteno de lernantoj kaj siaj familianoj kaj sub la forta helpo de frataj entreprenoj, ili finkonstruis la duan altfornon kun granda rapideco kaj elstara kvalito, tiel ke la fabriko finkonstruiĝis kaj komencis produkti antaŭ la fiksita dato.

Revoluciaj laboristoj de la Hongŝi-a Ŝtalfabrika forte kritikis la filozofion pri “sklaveco antaŭ fremdlandanoj” kaj “rampismon” dis-trumpetitajn de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki.




Mi Staras ĉe Ilmaŝino Fabrikita de la Patrio

EN la Granda Proletara Kultura Revolucio, la laboristoj de nia Ŝenjang-a Dua Ilmaŝina Fabriko projektis kaj fabrikis la “Radian Drilmaŝinon Kontraŭreviziisman N-ro 40” unuagradan en la mondo kun alta efikeco kaj alta precizeco. Komisiite de la revolucia komitato de la fabriko kaj fratoj-laboristoj mi venis, kune kun tiu ĉi ilmaŝino, al la Printempa Foiro de Eksportaj Varoj de Ĉinio 1969 en Kantono. Same kiel multaj aliaj produktaĵoj en ceteraj ekspozaj haloj, la ilmaŝino altiris la atenton de la amikoj de diverslandaj komercaj rondoj venintaj de diversaj anguloj de la mondo, de samlandanoj en Hongkong kaj Aŭmen kaj elmi-grintaj ĉinoj. Ĝi signas ke nia industrio de ilmaŝino jam atingis novan nivelon. Tio estas granda venko de la ĉiamvenka Maŭzedongpenso, estas riĉa rikolto de la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Starante ĉe la ilmaŝino fabrikita de la patrio, mi sentis min plena de senlima ĝojo en la koro kaj neelĉerpebla forto en la korpo.

Antaŭ la Liberiĝo, sub la malluma regado de la japanaj imperiistoj kaj Kuomintango, la Ŝenjang-a Dua Ilmaŝina Fabriko estis tre kaduka fabriketo kun riparo kaj fabrikado de maŝinpecoj kiel sia ĉefa entrepreno. Subpremate de la tri grandaj montoj—imperiismo, feŭdismo kaj burokrat-kapitalismo, ni laboristoj laboregis kiel brutoj, sed manĝis farunon el kverksemo, portis kanabsakon kiel veston, suferis senĉesajn insultojn kaj batojn, spertis ĉian amaron en la mondo.

En 1948, Ŝenjang estis liberigita, kaj de tiam ni laborista klaso fariĝis mastro de la lando. Sub la direkto de la brila penso de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj**”, nia fabriko fariĝis ilmaŝina fabriko post rekonstruo kaj grandigo. Sed ĝuste kiam ni klopodis por prosperiĝo kaj potenciĝo kaj entreprenis socialisman konstruadon, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki per tuta forto oponis kontraŭ Prezidanto Maŭ kaj Maŭzedongpenso, intencante retroruli la radon de la historio. Kaj sub lia patronado kaj subtenado, la plenmano da enpartiaj potenctenantoj irantaj la kapitalisman vojon de nia fabriko uzurpis parton de regpotenco de la fabriko, kontraŭstaris la revolucian linion de Prezidanto Maŭ, tial la produkto ĉiam troviĝis en “rampa” stato, ke la fabriko povis nur imiti fremdlandajn produktaĵojn sed ne povis mem krei. Al la laboristoj ne estis loko por disvolvi ilian forton. La granda gvidanto Prezidanto Maŭ komprenas la deziron de ni laborista klaso, kaj per sia genio kaj spirito de proletara revoluciisto persone bruligis la fajregon de la Granda Proletara Kultura Revolucio. Sekvante la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ “**pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj**”, kun revolucia sentima spirito ni laborista klaso forte ribelis kontraŭ Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, reprenis la parton de regpotenco uzurpitan de ili. Poste, Prezidanto Maŭ faris grandan instrukcion “**la laborista klaso nepre devas gvidi ĉion**”. Tio donis al ni laborista klaso la rajton gvidi ĉion, kaj de tiam, nia fabriko akiris novan



La aŭtoro kamarado Guan Ĝiming klarigas al albanaj honoraj gastoj pri la Radia Drilmaŝino Kontraŭreviziisma N-ro 40 en la 25-a Foiro de Eksportaj Varoj en Kantono.

vivon. La grupo de teknika revolucio de “triflanka kombiniĝo” kun laboristoj kiel ĉefa parto disrompis fremdlandajn rutinojn, mem projektis kaj provfabrikis novajn produktaĵojn unuagradajn en la mondo kiaj “Radia Drilmaŝino Kontraŭreviziisma N-ro 40”, “Horizontala Preciza Bormaŝino Dongfanghong N-ro 100” k.a. Sub la nutrado de Maŭzedongpenso, mi, la “sklavo-laborulo” kreskinta sub la skurĝo de la japanaj imperiistoj kaj kuomintang-aj reakciuloj, la plebano malestimita de la granda renegato Liu Ŝaŭki kaj reakciaj teknikaj “aŭtoritatuloj”, jam fariĝis la projektanto kaj fabrikanto de tiuj ĉi novaj ilmaŝinoj. Ho, kiom granda estas la ŝanĝiĝo!

Starante ĉe la ilmaŝino fabrikita de la patrio, mi propraokule vidis kaj propraorele aŭdis laŭdojn de amikoj de diversaj kontinentoj de la mondo. Tio estas gloro de la patrio kaj gloro de la ĉina popolo.

Iutage, 73-jara ĉina elmigrinto-maljunulino en Singaporo venis al la mekanika halo. Kiam ŝi aŭdis, ke tio estas nova ilmaŝino projektita kaj fabrikita de la laboristoj mem post kiam ili prenis

la teknikan regpotencon, ŝi levis dikfingron, balancis la kapon kaj diris kun emociiĝo: “Granda estas Prezidanto Maŭ!” “Granda estas la ĉina laborista klaso!” En la mekanika halo, albanaj kamaradoj laŭte kriis nereteneble: “Vivu Prezidanto Maŭ! Longe vivu Prezidanto Maŭ!” kaj fotis sin ĉe la ilmaŝino, kiam ili aŭdis mian klarigon ke tiu ĉi nova ilmaŝino estas projektita de la novtipa teknika projektgrupo kun la laboristoj kiel la ĉefa parto, ke ordinaraj laboristoj prenis sur sin ĉefan projektan laboron, fabrikis ĝin en mallonga tempo de nur kelkaj monatoj, ne imitante fremdlandanajn produktaĵojn, nek disponate de burĝaraj “specialistoj” kaj “aŭtoritatuloj”, senĉese resumante sperton per la ĉiamvenka Maŭzedongpenso. Iu germana amiko, kiam li vidis ke la “Radia Drilmaŝino Kontraŭreviziisma N-ro 40” varias sian rapidecon per silicia kontrolebla rektifilo anstataŭ dentradoj, li ripetade kriis “Bone!”. Li fojon post fojo kondukis siajn amikojn viziti tiun ĉi maŝinon kaj per mangesto petis min prezenti al ili; tiel li fariĝis spektatoro frekventanta tiun ĉi ilmaŝinon. Alitage, en la mekanikan halon venis multaj japanaj amikoj. Inter ili troviĝis homo nomata Kamimura Ju. Post mia klarigo li diris: “Kiam

Lernado de Plugo

KIAM mi venis al la kamparo por tie fiksloĝiĝi, ĝuste estis tre okupata sezono de printempa plugado. Iun tagon mi lernis plugadon de la maljuna malriĉkamparano Guo Tonghin.

Efektive, plugi teron estas ne tiel facile kiel oni opinias. Kvankam mi per la tuta forto tenis la tenilon de plugilo, tamen ĝi ankoraŭ ŝanceliĝadis jen dekstren jen maldekstren, kaj ĝia klingo moviĝis jen surteren, jen en la teron, jen tiuflanken, jen aliflanken, kvazaŭ ŝipeto veturanta sur ondanta maro, tranĉante serpentuman sulkon post si. Apude onklo Guo senĉese min direktis. Sed pro streĉiteco de la nervoj, tiam mi tute ne povis aŭdi lin. La ŝvito malsekigis mian tutan korpon, antaŭ ol mi plugis unu tutan sulkon. Mi forte spiradis kaj devigite haltigis la plugadon. Alpaŝante onklo Guo al mi diris: “Paŝante en la sulko oni povas trovi la direkton, sed ekster ĝi oni facile plugas sulkon malrektan . . .” Tion dirinte li rigardis miajn piedojn kaj eksilentis. Antaŭ ol mi sciis kion okazis, li daŭrigis: “Venu, iom ripozu kaj poste rekomencu.”

Tuj post sidiĝo onklo Guo la unua elprenis libreton *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj legis kune kun mi la jenan instrukcion de Prezidanto Maŭ: “**Nia eduka politiko devas ebligi al la edukatoj disvolviĝi morale, intelekto kaj korpe kaj fariĝi kleraj laboruloj kun socialisma konscio.**” Mi pensis: Kial onklo Guo klarigis al mi la edukan politikon instruante al mi plugadon? Li tuj daŭrigis kvazaŭ travidinte mian penson: “En la malnova socio, Kekiang, kvankam ni malriĉuloj pene laboregis ĝismorte lacigitaj, tamen ni havis nek manĝaĵojn nek veston, kaj eĉ devis migri aliloken por fuĝi katastrofon, peti almozojn kaj vendi niajn infanojn. En la nova socio, sub la gvido de Prezidanto Maŭ, ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj komplete liberiĝis. Vi eĉ povis viziti mezlernejon kaj estas pli feliĉa ol mi, tial ni devas aŭskulti vortojn de Prezidanto Maŭ, tute forĵeti kompletan daŭrigadon da nigraj varoj kia la diro ‘legi librojn estas rang’ plej alta, ĉio alia — la okup’ malalta’, kaj fariĝi ordinaraj laboruloj kaj daŭrigantoj de la revolucio!” Mi diris: “Onklo, responde al la alvoko de Prezidanto Maŭ, ni

mi revenis al mia patrolando en 1956 el via fabriko, mi estis teknikisto kaj via fabriko povis nur imiti fremdlandajn produktaĵojn sed ne povis mem projekti ilmaŝinon.” Tiam mi respondis al li: “Tio jam fariĝis historio, amiko. La ĉina laborista klaso, hardita en la Granda Proletara Kultura Revolucio kaj armita per Maŭzedongpenso, povas krei ĉian miraklon en la mondo.” Post miaj prezentado kaj eksplikado, li fine konvinkiĝis: “Vere granda estas la ĉina laborista klaso!”

Kvankam la foiro jam delonge fermiĝis, tamen, kiam mi staras ĉe la ilmaŝino fabrikita de la patrio mem, mi ĉiam nature rememoras pri ĉiu emocia sceno en la foiro de Kantono, sentas min

neesprimeble feliĉa en la koro kaj plena de neelĉerpebla forto en la korpo. Ĝuste kiel iu pakistana amiko taksis post sia vizito de la foiro. “Dank’ al la Granda Proletara Kultura Revolucio, la ekonomio de Ĉinio antaŭenmarŝas per mirinda rapideco. Tio elokvente manifestis, ke la ĉina laboranta popolo, kiu mastras sian sorton, havas senkomparan saĝon, kaj pruvis, ke la principo de Prezidanto Maŭ Zedong disrompi fremdlandajn rutinojn, esti **sendependa kaj memstara kaj sinapogi sur propraj fortoj** estas nekompareble saĝa kaj granda.” Estante la ĉina laborista klaso, ni sentas nin gloraj kaj fieraj.

*La aŭtoro estas veterana laboristo de la *Ŝenjang-a Dua Ilmaŝina Fabriko*.

venis por fiksloĝi en kamparo, kaj per tio ni ja celas kombiniĝi kun la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj fariĝi ordinara laboruloj.” “Prave!” sekvis onklo Guo, “sed por fariĝi ordinara laborulo kun socialisma konscio, la ŝlosila punkto troviĝas en penso. Prenu plugadon kiel ekzemplon, en tio tekniko estas afero duavica, plej grave estas, ĉu oni havas aŭ ne la penson de vera ordinara laborulo.”

Aŭskultinte la parolon de onklo Guo mi subite ekkomprenis. Ĵus onklo Guo iris kun nudaj piedoj en la sulko tenante la plugilon kaj plugis stabile kaj rekte. Sed mi mem portas sur la piedoj novajn ŝuojn kaj novajn ŝtrumpojn kaj ne iris en la sulko timante malpurigi ilin. Estas videble, ke la ĉefa kaŭzo, ke ĵus mi ne bone plugis la teron, ne kuŝis en tekniko, sed en penso.

Kun serena menso mi ĝoje diris: “Vi prave kritikis, onklo Guo, Prezidanto Maŭ instruis al ni: ‘La plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ili estas pli puraj ol la burĝaraj kaj etburĝaraj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekaĵon.’ Hodiaŭ vi donis al mi vivecan lecionon de reeduko kaj pli profundigis mian komprenon pri tiu ĉi instrukcio de Prezidanto Maŭ.” Aŭdinte tion, onklo Guo ĝoje frapetis mian ŝultron dirante: “Bone, vi vive studas kaj vive aplikas kaj rikoltas tujan rezulton. Eklaboru!”

Ĉifoje, imitante la maljunan malriĉkamparonon, mi demetis miajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn, suprenvolvis la pantalon tubojn kaj tenis plugilon per unu mano kaj svingis la vipon per la alia. “Hot!” Jen post mi aperis relative rekta sulko...

Eta Malsaĝa Avo

EN Donghe-brigado de Hiaje-komunumo, Gijuan-gubernio, Henan-provinco, troviĝas 14-jara paŝtknabo, kiun oni nomas Eta Malsaĝa Avo.

Lia vera nomo estas Ĝaŭ Hiaŭbaŭ. En la jaro, kiam li finis sian lernadon en elementa lernejo, la plantidoj velkis pro longdaŭra sekeco. Por protekti la plantidojn kontraŭ la sekeco, la komunumanoj devis ŝultre porti akvon de rivero supren al ŝtuparkampoj sitelon post sitelo kaj ĉiuj ŝvitegis pro la peza laboro. Vidinte tion, Ĝaŭ Hiaŭbaŭ estis tre tuŝita kaj ekpensis pri la fonto post la montdeklivo, ĉe kiu li ofte trinkigis bovojn. Li pensis: Prezidanto Maŭ alvokis nin disvolvi la spiriton de la Malsaĝa Avo kiu translokigis montojn, ĉu ni ne povos translokigi akvon? Ĉu tio ne estos pli bona ol ŝultroporti supren akvon de la rivero, se ni fosos kanaleton en la talio de la monto por alkonduki la akvon al la plej alta loko de la ŝtupar-

kampoj? Veninte al tiu ideo, li tuj kuris al la fonto. Li rigardadis jen tien, jen ĉi tien, uzis la tenilon de sia vipo kiel mezurstango por fari mezuradon. Longa vico da terbuloj estis lokita kiel signoj sur la mezurita loko sur la deklivo. Tiamaniere li determinis la linion kaj komencklokon de kanalo.

La sekvintan tagon, kunportante la *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj kun pioĉo sur la ŝultro, Ĝaŭ Hiaŭbaŭ venis al la montdeklivo por paŝti bovojn. Tie li kaj paŝtis la bovojn kaj fosis kanalon. Sed tuj en la komenco jam okazis incidento — la bovoj iris en kampojn, kiam li absorbiĝis en fosado. Informiĝinte, ke la bovoj manĝis plantaĵojn, lia patro forte riproĉis lin: “Ne plu petolu de nun, bubo! Kolektu ĉiutage du garbojn da brulligno, se vi havas tempon dum paŝtado.” Ĝaŭ Hiaŭbaŭ pensis: Estis malbone, ke la bovoj manĝis plantaĵojn; sed tute ne estas erare fosi kanalon utiligante senokupajn tempojn. Tial, li

ankoraŭ daŭrigis la fosadon ĉiutage post kolek-
tado de sufiĉa brulaĵo. Rimarkinte, ke la knabo
ĉiam kunportas instrumenton dum paŝtado, lia
patro timis, ke li ne povos bone paŝti bovojn,
kaj petis la estron de la produkta grupo doni la
vipon al iu alia kaj lasi Hiaŭbaŭ labori en kampoj.
Sed, la koro de Hiaŭbaŭ estis jam sorĉita de la
kanalo. Li konstruis ĝin en la tempetoj antaŭ
kaj post la laboro. Iatempe li eĉ ne revenis ĝis
profunda nokto aŭ simple tranoktis sur la monto.
La sekreto de Hiaŭbaŭ fine estis trovita de lia
patro kaj la estro de la produkta grupo. Tamen
lia agado tuj trovis ilian aplaŭdon kaj subtenon.

Aliaj knaboj, kiuj ofte paŝtis bovojn kune
kun Hiaŭbaŭ, ankaŭ aktive partoprenis lian en-
treprenon. Tamen, kiam ili fosis ĝis Hongŝa-
krutaĵo (krutaĵo el ruĝa sablo), tuj komenciĝis
diskutado inter la knaboj. Iuj diris: “Ĉe Hongŝa-
krutaĵo nenie oni povas stari kaj sur nenio oni
povas apogi. Kiel ni povos transpasi ĝin? Ĉesu
do.” Aliaj simple vetis: “Sur la kapo de azeno
elkreskus kornoj, se vi povus trahaki Hongŝa-
krutaĵon!” La respondo de Hiaŭbaŭ ĉiam estis:
“Faru firman decidon!” Hiaŭbaŭ obstine mordetis
en la krutaĵon pecon post peco per sia pioĉo.
Foje, pro mispaŝo li falis de sur la krutaĵo je preskaŭ
7 metroj alta kaj svenis. Post rekonsciiĝo, li
trovis sin kontuzita je la kapo, manoj kaj piedoj
kaj ŝanceliĝis lia decido pri konstruado de ka-
nalo. Ĝuste en tiu momento li ekmemoris la
instruon de Prezidanto Maŭ “Faru firman decidon,
timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn

por akiri venkon”. Li pensis: Oni timu eĉ nenian
oferon, pro kio do mi timu tiujn kontuzojn?
Laboru daŭre kaj ne ĉesu duonvoje! Tiel, li
decideme revenis al la konstruejo kaj finfine kon-
keris la krutaĵon.

Post Hongŝa-krutaĵo, antaŭ li staris tri rokoj,
kiuj estis ne pecigeblaj nek moveblaj por li. Ri-
gardante la rokojn Hiaŭbaŭ pensis: La Malsaĝa
Avo kuraĝis translokigi du montojn, ĉu mi povas
permesi la tri rokojn bari min? Mi neniel cedos
al malfacilo. Hiaŭbaŭ ekmemoris la instruon
de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ: “La
amaso estas vera heroo, dum ni mem estas ofte
infanece ridindaj.” Kaj li recitis al siaj kunuloj la
eldiron de Prezidanto Maŭ: “En tempo de mal-
facileco, ni devas vidi niajn atingajojn, devas vidi
la lumon kaj devas levi nian kuraĝon.” Studinte la
instruon de Prezidanto Maŭ, la knaboj ekhavis
pli altan memfidon por venki la malfacilon, kaj
finfine formovis la rokojn. Dank’ al aktiva par-
topreno, multe pli rapide progresis la fosado.

Sub la kuraĝigo de la revolucia spirito de la
Malsaĝa Avo, kiu translokigis montojn, Ĝaŭ
Hiaŭbaŭ kaj liaj kamaradoj luktis du monatojn
sur la montdeklivo, fosis pli ol 150 kubmetrojn
da tero kaj ŝtonoj, konstruis pli ol 10 digetojn
kaj finfine kondukis la akvon al la ŝtuparkampoj.
Poste, la malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkam-
paranoj helpis ilin plifortigi kaj ordigi la kanalon
kaj krome konstrui malgrandan akvokonservejon
ĉe la ekstremo de la kanalo. Nun pura akvo el
la fonto fluas al la sekaj kampoj kaj kontribuas
por riĉa rikolto.



Batalo per Minoj

Sub la gvido de la Komunista
Partio de Ĉinio, la ĉina popolo fin-
fine venkis la japanajn agresantojn
en la jaro 1945, post okjara heroo
rezistmilito. La vilaĝanoj tre ĝojis
supozante, ke la mallumaj tagoj jam
pasis. Sed kiu divenis, ke post eva-
kuo de la japanaj diabloj, la reduton
daŭre okupos la pupa trupo? Sek-

vintan tagon ĝi elpendigis ŝildon
de “Garnizono de Kuomintango”.
Kaj ĉiutage ĝi ankoraŭ iris al la
vilaĝo por prirabi la popolamasojn.
La popolamasoj ĝisoste malamis ilin
kaj insultis, ke ili estas “vampiroj”.
En tiu tempo Kuomintango gvida-
ta de Ĉiang Kajŝek, unuflanke, ĵon-
glis per falsaj pacaj paroloj, kaj ali-

flanke, komplotis kun la usona im-
periismo por aktive sin prepari al
grandskala atako kontraŭ la libe-
rigitaj regionoj. La reakciaj trupoj
de Kuomintango ĉie arestis kaj ma-
sakris popolamasojn, kiuj rezistis
kontraŭ la japana imperiismo, kaj
praktikis la politikon forrabi ĉion,
masakri ĉiujn kaj forbruligi ĉiujn

domojn. Por defendi la fruktojn de la venko de la Rezistmilito kaj sekurecon de la popolo, nia partio alvokis la vastan milicon de la liberigitaj regionoj vaste disvolvi atakojn kaj senhezite doni fortajn batojn al la kuomintangaj reakciuloj atakantaj la liberigitajn regionojn.

Iutage, la milica taĉmentestro Liu Jong ricevis instrukcion el la distrikta registaro por surprize ataki proviantan taĉmenton de la malamiko. Antaŭ tagiĝo, li gvidis 25 milicanojn enterigi minojn sur la ŝoseo kaj embuski en miliaj kampoj je pli ol 50 metroj for de ĝi. Kaj li mem ŝajnis sin fekaĵ-kolektanto por fari observon sur la ŝoseo. La suno jam brilis super la kapo, tamen li ankoraŭ ne vidis eĉ homombron. Liu Jong malpacientiĝis kaj seninterrompe rigardadis al la nordokcidenta fino de la ŝoseo. Subite post lia dorso eksonis trumpeto de aŭto, li sin returnis kaj ekvidis ĵipon de la malamiko alvenantan de post la monto. Liu Jong tuj eniris milikampon kaj ordonis la milicanojn sin pretigi al batalo. Baldaŭ, kiam la aŭto venis al la loko, kie troviĝis minoj, Liu Jong levis sian pistolon kaj kriis "ataku!" Tiam minoj eksplodis, kaj sonis ankaŭ grenadoj kaj fusiloj. Kvazaŭ vundita besto la ĵipo ruliĝis en apudan fosajon. Kiam la milicanoj sturmis antaŭen, kvar usonaj piratoj timigite genuis sur la tero kun levitaj manoj kaj tremis tutkorpe. Kun neretenebla indigno, Liu Jong riproĉis ilin, montrante la kadavrojn de du usonaj soldatoj surloke. "Japanaj diabloj kaj usonaj diabloj estas ŝakaloj el sama nesto. Al ĉiu, kiu aŭdacas etendi sian porkan rostron en nian landon, ni tuj forhakas ĝin!" Tiutempe, demalproksime sonis motoroj de aŭtoj, Liu Jong jam gvidis siajn milicanojn venke translokiĝi portante la batalakiritajn paŝilojn kaj municion.

En marto de 1946, Liu Jong informiĝis pri tio ke granda kvanto da malamikoj venos al Hiaŭji-vilaĝo por fari balaan operacion. Laŭ sia sperto en multjara batalado li pensis: "Nu, venu ili! Ni forpelis

eĉ la japanajn diablojn. Kion do signifas Ĉiang Kajŝek!" Li tuj kunvenigis la milicanojn kaj diris al ili: "Ĉifoje la malamikoj venos en granda nombro, ni do ne faros batalon per forto kontraŭ forto, sed ni devas venki la malamikon per malmulto kontraŭ multo. Laŭ mia opinio ni prefere regalu la malamikojn per ferŝelaj akvomelonoj, cento da tiuj certe jam sufiĉos por ili." Post tio ili tuj diskutis, kiel oni faru batalon per minoj.

Hiaŭji-vilaĝo situas post granda monto, antaŭ kiu staras du aliaj montoj kaj inter tiuj montoj estas longa kaj mallarĝa valo, tra kiu malgranda vojeto kondukas al Hiaŭji-vilaĝo. Sude de la granda monto, kuŝas ŝoseo. Liu Jong kaj liaj milicanoj unue mobilizis la amasojn de la vilaĝo translokiĝi alien kaj poste rapide enterigis minojn en la nokto. De la monttalo ĝis montsupro, de la ŝoseo ĝis la vojeto, ili faris kavojn sur grandaj kaj malgrandaj ŝtonoj kaj plenigis ilin per dinamito; laŭ la ŝoseo kaj montsuproj ili enterigis pli da minoj, tiel ĉiuj ŝtonoj fariĝis minoj kiuj formis minreton. Nur la montpasejo, valo kaj montpiedoj estis liberaj. La milicanoj embuskis post la minaj regionoj sur la montoj respektive, Liu Jong kaj pli ol 20 aliaj milicanoj defendis la centran monton en nordo.

Antaŭ la tagiĝo, subite gardostaranto anhele alkuris raporti: "De la oriento kaj okcidento de la urbo pli ol 800 malamikoj alvenas en kvar kolonoj kaj jam atingis lokon en distanco de ĉ.1 km. de ĉi tie." Aŭdinte ke la forto de la malamiko estas sepoble pli granda ol la ilia kaj konsciante ke la situacio estas serioza, Liu Jong kriis al la milicanoj sur la montoj: "Kamaradoj, alvenas jam la tempo por fari meritojn por la popolo! Por defendi la amasojn, ni firme repuŝu la malamikojn kaj ne lasu ilin antaŭeniri eĉ unu paŝon, eĉ se restus al ni nur unu homo." La milicanoj ĉiuj surven tre kuŝis sur la montoj, kiel sagoj sur streĉitaj arkoj kaj rigardis al la

montpiedo antaŭ si. Baldaŭ la malamikoj vere svarmis en la valon. Ne trovinte ion suspektindan, la malamikoj sentime sin puŝis amase al la montsuproj. Apenaŭ ili proksimiĝis al la montaj suproj, "bum" subite eksplodis unu mino sur la orienta monto, kaj nigra fumkolono leviĝis al la ĉielo, tuj sekve "bum, bum, bum" eksplodis minoj, kvazaŭ krevas la tero. En tiu tempo, ankaŭ la malamikoj sturmantaj al la okcidenta monto surpaŝis minojn. La malamikoj komprenis, ke ili estas trompitaĵ, kaj koncentris siajn fortojn por ataki la centran monton en la nordo. Sed ekster ilia atendo, ankaŭ tie minoj atendis ilin. Kiam ili surpaŝis la nordan deklivon, en palpebrumo leviĝis dinamitaj fumoj ruliĝantaj, en fumnebuloj kriis homoj kaj henis ĉevaloj, kaj la malamikoj retiriĝis rulfale de sur la monto. En tiu tempo Liu Jong elsaltis de la pinto de la norda monto kaj laŭte kriis: "Kamaradoj, sturmu!" Ankaŭ la milicanoj sur la aliaj du montoj kriis "sturmu!" kaj komencis rebaton kontraŭ la malamikoj. Ĉe la montpiedo ankaŭ la ĉaroj de la malamikoj uzotaj por forporti rabitan grenon trafis minojn, tuj kiam ili provis sin returni por eskapi, kaj perdis sian direkton pro la eksplodo. La malamikoj forkuris en paniko postlasante la ĉarojn, ĉevalojn kaj vunditojn.

Tiu ĉi batalo estis tre kontentige farita: Pli ol 140 malamikoj estis mortigitaj kaj vunditaj, 16 malamikoj estis kaptitaj, kaj 2 mitraletoj, 40 fusiloj kaj 64 ĉaroj kun pneŭmatikaj radoj estis batalakiritaj. La vilaĝanoj festis tiun grandan venkon kiel novjaron. Oni levis la dikajn fingron kaj diris: "Niaj milicanoj estas tiel bravaj, ke ili preskaŭ atingis nivelon de regulaj trupoj en batalforto!" Iuj diris: "Ni batis la japanajn diablojn, kaj nun ankaŭ la banditojn de Ĉiang Kajŝek; se la usona imperiismo kuraĝos alveni venontfoje, niaj milicanoj nepre donos al ĝi fortan baton!"

Fremdlingvaj Gazetoj el Ĉinio


Por ke la diverslandaj revoluciaj popoloj de la mondo ĝusttempe informiĝu pri la rapida disvolviĝo de la socialisma nova Ĉinio en diversaj flankoj, ni sincere rekomendas al niaj legantoj gazetojn eldonatajn de Ĉinio en diversaj lingvoj. Ili en diversaj flankoj raportas grandajn venkojn akiritajn de la ĉina popolo sub la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la socialisma revolucio, precipe en la Granda Proletara Kultura Revolucio, kaj iliajn brilajn atingojn en la socialisma konstruado; ili raportas pri la firma opozicio de la ĉina popolo kontraŭ la usona imperiismo, la moderna reviziismo kaj la diverslandaj reakciularoj kaj pri ĝia subteno al la revoluciaj bataloj de la subpremataj popoloj kaj subpremataj nacioj de la tuta mondo.



El Popola Ĉinio — sinteza gazeto eldonata monate en Esperanto.

Pekina Revuo — politika kaj teoria gazeto eldonata semajne en la lingvoj angla, franca, germana, hispana kaj japana, kaj distribuata al diversaj lokoj de la mondo per aviado.

Ĉinio — grandformata monata bildgazeto belega kun lakona teksto. Krom en la ĉina ĝi estas eldonata ankaŭ en la lingvoj angla, franca, germana, japana, rusa, hispana, araba, hindia, indonezia, itala, sveda, korea, ŝahilia, urdua kaj vjetnama.




Ĉinio en Konstruado — sinteza gazeto riĉe ilustrita kaj eldonata monate en la lingvoj angla, franca, hispana, araba kaj rusa.

Ĉina Literaturo — literatura kaj arta gazeto eldonata monate en la angla lingvo kaj sezone en la franca.

Popola Ĉinio — sinteza gazeto eldonata monate en la japana lingvo.

La supre rekomenditaj gazetoj nun komencis akcepti abonantojn por 1970. Abonu kaj abonigu! Varban faldfolion povas senpage ricevi ĉiu petanto.

Distribuas: Guozi Shudian (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj), Pekino, Ĉinio
Haveblaj ĉe lokaj librovendejoj aŭ rekte ĉe la Sekcio por Poŝta Mendo, Guozi Shudian, P. O. Kesto 399, Pekino, Ĉinio



La Hinda Popolo en

Abismo de Mizero

LA komprador-burokrata grandburĝaro, la grand-bienularo kaj la gvidanta kliko de la enpotenciĝinta Nacia Kongreso de Hindio estas fidelaj lakeoj de la usona imperiismo kaj social-imperiismo.

Por prirabi kaj ekspluati la hindan popolon, la usona imperiismo kaj social-imperiismo nepre devas subteni la hindan reakcian registaron reprezentantan la interesojn de la komprador-burokrata grandburĝaro kaj la bienula klaso, kaj por teni sian putran kaj dekadencantan feŭdan regadon la hundoj de la usona imperiismo kaj social-imperiismo nepre devas pliapaŝe sin dependigi al siaj mastroj kaj forvendi la interesojn ĉe sia nacio. Hodiaŭ Hindio estas jam reduktita al nova kolonio de la usona imperiismo kaj social-imperiismo.

LA HINDA POPOLO VIVAS EN TERURAJ SUFEROJ

Sub la kruela regado de la grandbienularo kaj la grandburĝaro, la agrikultura produkto de Hindio suferas seriozan detruon, grave disvastiĝas malsata plago, grandaj nombroj da fabrikoj bankrotis aŭ troviĝas en manko de kruda materialo kaj akute plimultiĝas senlaboruloj.

Laŭ evidente malgrandigitaj ciferoj malkaŝitaj de hindaj reakciaj ĵurnaloj, ĉijare Rajasthan, Haryana, Gujarat, Uttar Pradesh, Madhya Pradesh, Mysore, Madras, Andhra, Bihar suferas seriozan malsaton, kaj troviĝas 55 milionoj da malsatantoj en 95,000 vilaĝoj.

En Rajasthan, 13 milionoj da popolanoj en 22,800 vilaĝoj troviĝas en serioza malsato. Ĝis la

fino de majo 23,000 popolanoj jam mortis pro malsatego.

En Haryana, malsatego envolvis 2,000 vilaĝojn suferigante milionon da popolanoj. En Gujarat, greno mankas al 800,000 popolanoj, kaj en Bihar greno mankas al almenaŭ 600,000 popolanoj.

Akute kreskas la senlaborularo en Hindio. La nombro de senlaboruloj kreskis de 3 milionoj

*Terure malsata hinda maljunulo
tute senhelpa fariĝis skeleto.*



en 1951 ĝis 7 milionoj je la fino de la periodo de la “dua kvinjara plano” en marto de 1961, kaj ĝis 13 milionoj kun 16 milionoj da duonsenlaboruloj je la fino de la periodo de la “tria kvinjara plano” en marto de 1966.

Pro malboniĝo de la ekonomio grandaj nombroj da fabrikoj fermis siajn pordojn aŭ funkcias ne plenkapable.

586 fabrikoj ĉesis funkcii en 1968. Fermo de 80 teksejoj tra la lando ĵetis 93,000 laboristojn en senlaborecon.

En la sama tempo grandaj nombroj da fabrikoj funkciis per malpli ol 60 procentoj de sia kapablo.

Amasiĝis ĝiaj ŝuldoj al fremdaj landoj. Ĝis 1968, Hindio portis eksterlandajn ŝuldojn de 63,030 milionoj da rupioj, inter kiuj 47,390 milionoj devas esti repagotaj en fremda valuto.

La faktoj montras, ke la krima regado de la grandbienularo kaj grandburĝaro de Hindio estas la kaŭzo de la suferego de la hinda popolo. La grandbienularo kaj grandburĝaro de Hindio puŝis la vastajn popolamasojn en abismon de mizero. Tio akcelas la vekiĝon kaj reziston de la hinda popolo.

INUNDO EN ASSAM

Rezulte de efektivigo de la landoplacanta kaj popolruiniga politiko de la hinda reaktularo la mizerego de la vasta hinda laborularo profundigis

kun ĉiu tago. Oficiala parolanto de la hinda reaktularo registaro proklamis lastatempe, ke en Assam de Hindio pli ol 30,000 akreoj da kulturataj kampoj estis detruitaj de inundo, kaj 500,000 loĝantoj fariĝis viktimoj. Pro kovro de inundakvo al ŝoseoj kaj fervojaj stacioj preskaŭ la tuta Assam estis izolita.

Krome, en la regiono Cachar, kie produktiĝas teo, rezulte de inundo de la rivero Barak kaj ĝiaj branĉoj kelkmil popolanoj senhejmiĝis. En la monta regiono Mizo pro inunda katastrofo almenaŭ 50,000 popolanoj senhejmiĝis.

KALKUTO EN MIZERO KAJ MALSATEGO

Kalkuto, la unua granda urbo en Hindio stariĝita de la hinda laboranta popolo, fariĝis urbo kun sennombraj kadukaj loĝejoj de mizeruloj sub la regado de la hindaj reaktuloj. Tie pli ol miliono da popolanoj senlaboriĝis kaj pli ol cent mil senhejmiĝis. La vastaj amasoj de la laboranta popolo baraktas en agonio pro malsatego kaj malsano.

Kalkuto estas urbo kun 7,500,000 loĝantoj kie koncentriĝas industrioj de Hindio, kaj estas ankaŭ unu el la ĉefaj havenoj por eksterlanda komerco de Hindio. Sed la vasta laboranta popolo vivas en ekstrema mizero pro longtempa reaktulara regado de la grandbienularo kaj grandburĝaro de Hindio. Oni raportis, ke en Kalkuto almenaŭ unu miliono da plenkreskuloj ne havas regulan



Virinoj kaj infanoj vagantaj sur stratoj de Kalkuto en Hindio baraktas ĉe la rando de morto.



Hindaj popolamasoj manifestacias por oponi kontraŭ la teroro de la reaktia registaro. Jen manifestaciantaj amasoj en Hyderabad brave luktas kontraŭ reaktiaj armitaj policianoj per elterigita elektra stango.

okupon. Ili ofte kolportas kaj malfacile sin vivtenas. En la urbo troviĝas 100,000 homoj kiuj senhejmiĝis kaj vagadas de strato al strato tutajn tagojn. Tage ili almozpetas de pasantoj kaj nokte ili sternas ĉifonan litkovrilon sur trotuaron kaj kuŝiĝas sur ĝi por tranokti. Kvarono de la loĝantoj de la tuta urbo loĝas en kadukaj kabanaj el ligno. Ordinare unu familio loĝas nur en unu tia kabano, kies plankareo estas maksimume nur 9 kvadrataj metroj. Ĝi ne havas fenestron kaj tiel malalta ĝi estas ke plenkreskulo eĉ ne povas rekte stari en ĝi. La monata lupago por tia kabano atingas eĉ 14 rupiojn, kiu sumo konsistigas ĉ. trionon de la salajro.

En ĉiu jaro la reaktia registaro de Hindio faras ĉantaĝojn al la popolo kaj devigas ĝin pagi multspecajn impostojn. Sed en la lastaj 25 jaroj, neniam plimultiĝis la ekipaĵoj por la publikaj servoj en Kalkuto. Sur la stratoj ĉie kuŝas rubamasoj. Akvoprovizo kaj defluigo de malpura akvo troviĝas en malfacilego, regas epidemioj kiuj serioze minacas la sanon kaj vivon de la popolo.

Neniam ĉesis la batalo de la kalkuta popolo kontraŭ la hinda reaktia aŭtoritato. En la lastaj

jaroj, por elvendi la revolucion de la hinda popolo, la hindaj reviziistoj kiuj tenas la regpotencon de la registaro de la okcidenta Bengal distrumpetas "parlamentan vojon" kaj trompas la hindan popolon dirante, ke se ili enpotenciĝos, ili faros sian eblon por "redukti la suferon de la popolo". La reala ĉiam pli mizera kaj suferplena vivo de la vasta laboranta popolo de Kalkuto ĝuste estas la plej forta akuzo kontraŭ tiuj reviziistoj. La hinda revolucia popolo nun leviĝas brave al batalo, kaj ĝi certe balaos la hindajn reaktiularon kaj reviziistojn en la historian rubejon.

Kie troviĝas subpremo, tie aperas rezisto. Sub la gvido de la veraj marksist-leninistoj de la Komunista Partio de Hindio la hinda popolo jam ekbruligis fajregon de armita batalo. La revolucia batalo de la kamparanoj de Kerala skuis la tutan landon. Nun, la naciliberiga batalo de la naga-, mizo- kaj kuki-gentoj jam atingis novan etapon. Estas tute certe, ke se nur la hinda popolo persistas en la vojo de armita batalo, ĝi fine enterigos komplete la usonan imperiismon, social-imperiismon kaj iliajn lakeojn!

Venke apartenos al la hinda popolo!

**ŜANHAJO PRODUKTIS RAPIDE
MUNTEBLAJN KALDRONEGOJN
POR UZADO EN INDUSTRIO**

En iom pli ol du monatoj de la unua duono de la kuranta jaro, disvolvante la proletaran spiriton de ĝisfunda revolucio kuraĝi pensi kaj kuraĝi agi, la vastaj laboristaj amasoj de Ŝanhajo fabrikis 1,000 ĉinstilajn rapide munteblajn kaldronegojn por industria uzo. Centoj da fabrikoj kaj unuoj instalis tian kaldronegon memfabrikitan de nia lando, kiu konsumas malplimulte da karbo, generas pli multe da varmo, okupas malgrandan spacon kaj estas facile funkciigebla. Tio multe altigis la batalspiriton de la ĉina laborista klaso, multe subpremis la arogantecon de imperiistoj, reviziistoj kaj reakciuloj kaj kreis favoran kondiĉon al Ŝanhajo pliapaŝe pliprodukti industri-ajojn por subteni la socialisman konstruon en diversaj lokoj.


En la pasinteco, multaj el la kaldronegoj uzataj sur la batalfronto de industrio kaj trafiko de Ŝanhajo estis malnovtipaj kiaj Lancashire, Cornish kaj Cochran. Iuj el ili estis antikvaĵoj enportitaj de britaj kaj usonaj imperiistoj dum agreso al nia lando, aliaj estis kopie fabrikitaj post la Liberigo de enpartiaj potententantoj irantaj la kapitalisman vojon kaj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" laŭ antaŭcentjaraj malnovaj tipoj de imperiismaj landoj dum antaŭenpuŝado de sklaveco antaŭ fremduloj kaj rampismo de la granda renegato Liu Ŝaŭki. Tiuj kaldronegoj konsumis multan karbon, produktis malmultan varmon kaj malŝpare konsumis kelkcent mil tunojn da karbo en ĉiu jaro. Nun post kiam la fabrikoj instalas anstataŭe ĉinstilan rapide munteblan kaldronegon, radikala ŝanĝigo okazis al karbokonsumado de kaldronegoj en la ŝanhaja industrio, nome multaj branĉoj sukcesis pliprodukti sed ne pliigi konsumkvanton de karbo aŭ pliprodukti kaj samtempe ŝpari karbon. Ekzemple, la 28 fabrikoj de la Ŝanhaja Prestinktura Kompanio antaŭe havis 68 malnovajn kadukajn kaldronegojn de diversaj fabrikmarkoj kaj la tuta industria branĉo konsumis ĉiumonate pli ol 38,000 tunojn da karbo. Nun

54 rapide munteblaj kaldronegoj anstataŭis la kadukajn kaldronegojn. Ekde majo, la kvanto de konsumita karbo malaltiĝis ĝis ĉirkaŭ 28,000 tunoj kaj ĉiumonate 10,000 tunoj da karbo estas ŝparitaj.

**UNUAPAŜA VENKO AKIRITA
EN JUNGADO DE TUO-RIVERO
KAJ FOSADO DE NOVA
BIAN-RIVERO**

Laŭ la granda instruo de Prezidanto Maŭ pri unuiĝo por jungado de riveroj, la popoloj de tri provincoj Henan, Anhuj kaj Giangsu, kiuj havas inter si tradician revolucionan amikecon, batalis unuanime ŝultron ĉe ŝultro kaj akiris tre grandajn sukcesojn en jungado de Tuo-rivero kaj fosado de Nova Bian-rivero. La konstrua laboro por jungado de la 90-kilometra parto de Tuo-rivero en Henan kaj Anhuj jam tute finiĝis je la fino de majo; 90 procentoj de terlaboro de pli ol 150-kilometra parto de Tuo-rivero kaj Nova Bian-rivero en Anhuj kaj Giangsu jam estas plenumitaj. Dum la eksterordinare granda riverŝvelo en printempo de la kuranta jaro, tiuj konstruaĵoj jam montris evidentan efikon kaj evitigis katastrofon al milionoj da muoj da tero.

Tuo-rivero estas unu el la gravaj akvosistemoj en la baseno de Huaj-rivero kaj ĝi estas la ĉefa drena fluejo de orienta Henan, norda Anhuj kaj norda Giangsu kondukanta al Hongze-lago. Por malfermi larĝan drenan fluejon al diluvo el la supra baseno, liberigi la mezan kaj malsupran basenon de minaco de diluvo kaj radikale elimini diluvon en la tri provincoj, oni planis bari Tuo-riveron kaj Suj-riveron en Suhian de Anhuj-provinco kaj entrepreni grandan laboron de fosado de Nova Bian-rivero. Post finfosado de Nova Bian-rivero, la akvo sur pli ol ses mil naŭ cent kvadrataj kilometroj povos senbare flui en Hongze-lagon kaj samtempe solviĝos la problemo de drenado de superakvo por pli ol 15 milionoj da muoj da tero en la tri provincoj.



Letero de Aŭstria Leganto W. K.

Okaze de la jarŝanĝiĝo 1968-69, ricevinte la valorajn donacojn (kalendaro, notkajero kaj sondisko el "La Ruĝa Signal-lanterno"), kortsita pro tiu grandanima gesto mi adresis dankleteron al vi. Por iome-

te respondi la malavarajn pruvojn de via amikeco, mi ankaŭ sendis al vi sondiskon: Esperanto-kantojn, verkitajn kaj kantitajn de Ramona van Dalsem. Mi petas vin bonvole sciigi al mi, ĉu vi ricevis la diskon aŭ ne. En la lasta kazo mi provus sendi duan sondiskon. Eble vi povas konsili al mi pli sekuran vojon ol la kutiman.

Ĉe tiu okazo mi ankaŭ dankas al vi por la regula alsendo de la mirinda revuo "El Popola Ĉinio". Mi samegale admiras vian modelan Esperanton kaj la artistajn fotojn. Mi sincere konfesas, ke niaj revuoj

ne atingas tiun ĉi altan nivelon: bonan paperon, klaran preson kaj antaŭ ĉio eksterordinare artismajn fotojn, ĉion en teknike perfekta kvalito.

Sed, la ekstera aspekto ne estas la plej grava punkto, tio estas la spirito de la enhavo. Mi estas konvinkita, ke nia okcidenta (kapitalisma, burĝa) kulturo dekadencas kaj ne plu estas sanigebla. Estas malrapida, sed nehaltigebla procedo. Nia sociformo degeneras precipe en morala senco pro manko de idealoj, pro egoisma pensado, emo al friponadoj, krimoj kaj nenaturaj doma-

LECCIONOJ DE ĈINA LINGVO

让 更多的人
Ràng Gèngduōde Rén
Lasi Pli Multajn Homojn

听到 毛主席
Tīngdào Máo Zhǔxí
Aŭdi Maŭ Prezidanto

的 声音
de Shēngyīn
de Voĉon

在日本 有一位 汽车 司机
Zài Rìběn yǒu yīwèi qìchē sījī
En Japanio troviĝas iu aŭtomobila ŝoforo

和他的 妻子, 每天 晚上 都要
hé tāde qīz, měitiān wǎngshàng dōuyào
kaj lia edzino, ĉiutage vespere senescepte

收听 北京 电台 的 广播, 并且
shōutīng Běijīng diàntái de guǎngbō, bìngqiě
aŭskultas Pekina Radiostacio de brodkaston, kaj plie

認真地 記下 广播 内容 提要, 印成
rènzhēnde jìxià guǎngbō nèiróng tíyào, yìnchéng
serioze notas brodkastan enhavan resumon, presas

材料, 免費 送給 一些 友好
cáiliào, miǎnfèi sònggěi yīxiē yǒuhǎo
(kiel) materialon, senpage donacas (al) iuj amikaj

团体 和 个人。他們 說: "我們 要
tuántǐ hé gèrén. Tāmen shuō: "Wǒmen yào
organizoj kaj individuoj. Ili diris: "Ni volas

让 更多的 人 听到 毛 主席 的
ràng gèngduōde rén tīngdào Máo zhǔxí de
lasi pli multajn homojn aŭdi Maŭ Prezidanto de

ĝaj malvirtaj ĝuoj kiel alkoholismo kaj narkotmanio. Sed ankaŭ ekonomie nia kulturo senhalte malleviĝas. Nia ekonomia sistemo estas la "konsumsocio", kies idolo estas la profito. Ruzaj entreprenistoj elpensas artefaritajn bezonaĵojn, fabrikas tute nenecesajn komercaĵojn pro kies debito ili surscenigas gigantan multekostan reklamon. La kapitalista demagogio predikas: "Ekonomia principo, la sekreto de bonstato, estas produkti kaj konsumi kiel eble plej multe. Homoj, aĉetu ĉion kion permesas via monerujo, sen-diference kio ĝi estas aŭ ĉu vi tion bezonas aŭ ne! Tiamaniere la tu-

ta nacio atingas la plej grandan bonstaton!"

Sur la kampo de la artoj manifestiĝas la degenero en evidente frenezaj fuŝaĵoj, nekomprenblaj skulptoj kaj bildoj, kaj idiotaj kantoj — en verkoj, kiuj kongruas kun produktoj faritaj de mensmalsanuloj.

En ĉi tiu senco mi vidas en la ĉina kultura revolucio la savon de la homaro.

La mondhistorio instruas nin, ke jam ofte saĝaj viroj provis sanigi putrajn homajn socisistemojn. Kelkaj el ili atingis ankaŭ sukceson, sed ne daŭran. La pioniroj ĝuste en-

vojigis revoluciojn, sed la epigonoj denove dekadencis. Tio ŝajnas esti ĝenerala leĝo. Mi hipotezas, ke la ĝisnunaj revolucioj pli malpli nur estis ekonomiaj revolucioj, sen sufiĉe morala resanigo. Por daŭra bonigo, antaŭ ĉio, necesas kultura revolucio, kiu nun la unuan fojon okazis en Ĉinio.

Tutkore mi deziras, ke via genia gvidanto Maŭ Zedong trovu la ĝustan vojon al tiu celo.

Tutkoran dankon al vi por viaj pruvoj de amikeco kaj samideanan saluton al vi.

声音, 了解 新 中国 的 巨大
shēngyīn, liǎojiě xīn Zhōngguó de jùdà
voĉon, informiĝi (pri) nova Ĉinio de giganta

变化。
biànhuà.”
ŝanĝiĝo.”

TRADUKO

Lasi Pli Multajn Homojn Aŭdi la Voĉon de Prezidanto Maŭ

En Japanio troviĝas iu ŝoforo kaj lia edzino, kiuj senescepte ĉiuvespere aŭskultas la brodkaston de la Pekina Radiostacio kaj serioze notas resume la enhavon de la brodkasto por ĝin prese multobligi kiel materialon kaj donaci senpage al amikaj organizoj kaj individuoj. Ili diris: "Ni volas lasi pli multajn homojn aŭdi la voĉon de Prezidanto Maŭ kaj informiĝi pri la giganta ŝanĝiĝo en la nova Ĉinio."

Jen estas ekzerco de nia leganto, kiu ĝin faris kaj alsendis al ni post lerno de la unua leciono en la rubriko "Lecionoj de Ĉina Lingvo".

7. Zuerst werden die Striche der linken Seite geschrieben, und dann die der rechten:

他 tā / 一 一 一 他 tā
好 hǎo / 一 一 一 好 hǎo

8. Horizontale werden vor den vertikalen geschrieben, wenn sie sich kreuzen oder berühren:

干 gān 干 gān
井 jǐng 井 jǐng

9. Wenn sich linke und rechte Striche berühren oder kreuzen, so werden die linken zuerst geschrieben:

人 rén 人 rén
家 jiā 家 jiā

10.äußere Striche werden vor den inneren geschrieben, wenn die äußeren als inneren vollständig einmünden, so wird jedoch der äußere horizontale zuletzt geschrieben:

句 gù 句 gù
国 guó 国 guó
四 sì 四 sì

(Aus der Zeitschrift
zu POPULA ĈINIO April 1957
S. 116-117)

Sur la

kovrilo:

Kamarado Sun Jugo de iu trupo de PLA, kiu glorie faris unuaklasan meriton en la batalo por defendi Ĝenbaŭ-insulon de nia lando, kune kun siaj kunbatalantoj vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson.

Sur la

dorskovrilo:

Militŝipo de nia popola mararmeo patrolas sur la maro por defendi la marteritorion de nia patrolando.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 11 (136) 1969

Ĉefa Enhavo

Kamarado Lin Biaŭ en la Periodo de la Liberiga Milito en Nordoriento

La Popola Armeo Amas la Popolon

La Popolo Varme Amas Sian Armeon

Datreveno de la Ekmarŝo de la Laborista Klaso en la Superstrukturan Sferon

Remuldi Intelektulojn laŭ la Fizionomio de la Laborista Klaso

Ŝanĝiĝo de Insularo

Riĉa Rikolto de Laminario

Surmaraj Junulinoj

Rapide Kreskas la Vicoj de Inĝenieraj Teknikistoj de la Ŝanhaja Ilmaŝina Fabriko

Mi Staras ĉe Ilmaŝino Fabrikita de la Patrio

Lernado de Plugo

Eta Malsaĝa Avo

Batalo per Minoj

La Hinda Popolo en Abismo de Mizero



Nova Metiaro

Vivu la Amikeco inter Ĉinio kaj Albanio!
(Eburna Skulptaĵo de Fugian-provinco)



O.kupi per Maŭzedongpenso la Literaturan kaj Artan Pozicion en la Kamparo

En Erlangmiaŭ-komunumo de Luŝan-gubernio, Henan-provinco, troviĝas postlabora literatura kaj arta propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel la ĉefa forto. Ĝi propagandas Maŭzedongpenson per diversaj manieroj, disvastigas plej novajn instrukciojn de Prezidanto Maŭ per plej alta rapideco kaj kune kun la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj partoprenas la revolucionan praktikon de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento en la kamparo. Pro tio ĝi estas nomata de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj "nia propra propaganda taĉmento".

(*Maldekstre*) Por propagandi Maŭzedongpenson la propaganda taĉmento ofte transgrimpas montojn kaj travadas riverojn. Jen ĝi iras al montvilaĝoj.

Kian Hiufang (*dekstre*) titolata de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel "ruĝa propagandistino" studas la politikan raporton de Vicprezidanto Lin kune kun la maljunaj malriĉkamparanoj.





让毛主席最新指示
一刻不停传遍山村



(1) Telefonistino de la komunumo transkomunikas la plej novan instrukcion de Prezidanto Maŭ per telefono al diversaj montvilaĝoj.

(2) La gemembroj de la propaganda taĉmento studas verkon de Prezidanto Maŭ dum kamplabora ripozo.

(3) La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj gaje spektas la prezentadon.

(4) La taĉmento propagandas al la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj la spiriton de la Naŭa Kongreso de la Partio por akceli plenumon de la taskoj de batalo, kritiko kaj reformo en la kamparo.

(1)

(3)







下定决心 不怕牺牲
排除万难 去争取胜利

FOR THE
HONOR OF
THE U.S. NAVY